



OFICIALA ORGANO DE MONDPACA ESPERANTISTA MOVADO

V-a jaro. N-o 51-52.

Ĉeĥoslovaka eldono

Februaro-marto 1958

NI SALUTAS GRANDAN PACDEFENDANTON

Antaŭ kelka tempo transdonis la ministro por eksterlandaj aferoj de Hindio mesaĝon de ĝia ministro-prezidanto D. Nehru al la registaroj de Sovjet-Unio kaj U. S. A. kun jena teksto:

»Mi permesas al mi turni min al la plej altaj reprezentantoj de la Unuigitaj Ŝtatoj Amerikaj kaj Sovjet-Unio. Tion mi faras kun absoluta modesto sed granda sincereco. Ni, en Hindio, havas seriozajn problemojn. Tamen mi daŭre pensas pri la krizo de la civilizacio, kiu minacas la mondon, kaj kiun la mondo ankoraŭ neniam spertis.

Mi kredas, ke Ameriko kaj Rusio povas ĉi krizon solvi kaj savi la homaron de terura katastrofo, kiu al ĝi minacas. Nia tero estas tro malgranda por la nova armilo de la atoma epoko, kaj samtempe la homo, dank' al sia prudento kaj scio konstruas vojon en la interplanedaran spacon kaj trairas la ĉielon. La ekzisto de la homaro mem estas endanĝerigita. Hodiaŭ jam ekzistas sufiĉe da armiloj por amasa pereigado. Ameriko kaj Rusio disponas ilin abunde. Ankaŭ Granda Britanio posedas ĉi armilon. Kaj morgaŭ ĝin havos verŝajne ankaŭ aliaj landoj kaj povas okazi, ke la homaro eĉ ne kapablos ĝin kontroli.

Estas aranĝataj kernarmilaj proveksplodoj, kiuj venenigas la aeron, akvon kaj nutraĵojn kaj rekte domaĝas al la nuntempa kaj estontaj generacioj.

Neniu lando kaj neniu popolo, estante kiom ajn forta, povas supozi esti sekura kontraŭ pereco, se la vetkurado en la produktado de amaspereigaj armiloj daŭros kaj se daŭros la »malvarma milito«.

Krom tiu ĉi danĝero estas la civilizacio, kreita dum miljaraj penoj de la homaro, dismordata kaj minacata de timo kaj malamo kaj sinsekve likvidota, se ĉi tendencoj daŭros.

Ĉiuj nacioj de la mondo rajtas vivi, progresi kaj memstare decidi sian sorton. Ili rajtas havi pacon kaj sekurecon. Ĉiujn ĉi rajtojn ili hodiaŭ povas konservi nur sub la kondiĉo de komuna paca vivo, solvante ĉiujn siajn problemojn per pacaj metodoj. Ili havas diversajn religiojn, konvinkojn kaj ideologiojn. Ili ne povas ŝanĝi reciproke ĉi kredojn de unu al alia perforte aŭ minacante per forto (potenco), ĉar ĉiu tia eksperimento kondukus al tutmonda katastrofo. La unusola vojo estas paca kunvivo indiferenta al politika koncepto kaj ne uzado de politiko de malamo kaj perforto. Tion postulas la morala kaj etika vidpunkto, sed ankoraŭ pli por ĉi vojo parolas la sana homa prudento.

Mi ne dubas pri la ebleco aranĝi tion. Mi ne dubas, ke Ameriko kaj Rusio kapablas malebligi la terurojn, kiuj minacas la tutan homaron kaj venenigas niajn mensojn kaj nian estonton.

Milionoj da homoj fidis al tio, kion oni nomas «okcidenta kapitalismo, kaj milionoj kredas al komunismo. Sed ekzistas milionoj da homoj, kiuj aniĝis nek al tiu, nek al la alia ideologio, sed spite

tio ili penas pri amikeco kun la ceteraj, pri pli bona vivo kaj pli sekura estonteco.

Mi parolas en mia propra nomo, sed mi supozas esprimi la pensojn de grandega amaso da homoj en nia lando kaj eĉ de aliaj landoj en la mondo.

Pro tio mi kuraĝas turni min kun mesaĝo al la plej altaj reprezentantoj kaj aparte al la reprezentantoj de Ameriko kaj Rusio, en kies manojn la sorto koncentrigis tiel kolosalan forton, kiu kapablas influi la tutan mondon, povante ĝin levi en plej altajn sferojn aŭ puŝi ĝin en malfeliĉon.

Mi prezentas al ili mesaĝon, ke ili ĉesu ĉiujn eksperimentojn kun kerneksplodoj, montrante per tio al la mondo, ke ili estas pretaj forigi ĉi danĝeron kaj plue klopodi por efika senarmado.

En la momento, kiam tiel okazos, grandega ŝtono forfalos de la homara koro. Sed necesas ne nur fizikaj ŝanĝoj. Necesas penadi por forigi timon kaj ŝanĝi la danĝeran tendencon, kiu minacas la pluan ekzistadon de la homaro. Tiuj ĉi problemoj povas esti solvataj nur sur la bazo de rektaj rilatoj kaj interkonsentoj atingitaj per pacaj rimedoj.«

Ĝis ĉi tie la mesaĝo de la hinda ministroprezidanto D. Nehru.

La hinda ministroprezidanto Nehru jam de longe estas bone konata per sia konduto kaj publikaj proklamoj por la paco al ĉiuj pacamaj homoj en la mondo. Sed tiu ĉiu lia lasta mesaĝo fakte havas apartan signifon. Tion dokumentas al ni la unua ĝojiga rezulto, ke Sovjet-Unio jam donis klaran respondon pere de sia ministroprezidanto N. A. Bulganin, nome, ke Sovjet-Unio ĉesos ĉiujn eksperimentojn kun eksplodigoj de kernarmiloj, kondiĉe ke Ameriko kaj Gr. Britio same faros. Ĝi proponas ĉesi la eksperimentojn ek de la 1-a januaro 1958. En ampleksa respondo inter aliaj, Sovjet-Unio proponas amikajn rilatojn al USA kaj Grand-Britio, same kiel al ceteraj ŝtatoj kaj esperas tiamaniere fine atingi kompletan malarmadon en la tuta mondo. Kiam mi skribas ĉi tiujn liniojn ankoraŭ vakas la respondoj de USA kaj Britio, sed ni esperu, ke ankaŭ ties respondoj estos klaraj kaj pozitivaj, aliel ili ja mem konfesus esti malamikoj de la paco kaj poste restus nur la sola vojo, ke iliaj popoloj mem prenu la respondecon en siajn manojn.

Rudolf BURDA, Ĉeĥoslovakio



Luna regiono (la bildo kun ĉeha titolo estas kopiita el „RUDE PRAVO”)

Centojn kaj milojn da interesaj prelegoj aranĝos la estontaj vojaĝantoj tra la universo, centoj da libroj estos — kaj tio eble jam ne daŭros tiel longe — skribataj pri la unuaj vojaĝoj de homoj sur la lunon kaj la proksimajn planedojn.

Dume al ni restas nur la ebleco mediti — kaj iomete permesi procedon al la fantazio pri tio, kiel tiaj vojaĝoj iam aspektos, kiel la homoj vivos kaj laboros en tiuj malproksimaj mondoj.

Kaj se fantazion, do ĝi estu jam en la vera senco de la vorto. Ne nur, kiel la unua raketo kun homoj atingus la lunon, sed jam pri tio, kiel komforte kaj utile iam la homoj sur tiu ĉi natura mondsatelito etabliĝos.

Nia pentristo provis bildigi tipan rigardon sur lunan regionon, kaj starigis en ĝin eĉ homan verkon. Al la ĝisnunaj konoj kaj imagoj de astronomoj tiu ĉi fantazio tute respondas.

NI DO RIGARDU LA LUNON EN LA JARO 2.000 KAJ IOM PLI:

Dekkvar ĉimondaj tagoj prezentas unu tagon surlunan. La pluaj 14 ĉi-mondaj tagoj signifas sur la luno unu nokton. Tage kaj nokte (diference de la tero) ĉi tie kun la sama intensiveco sur malhela firmamento — pli malhela ol estas dum plej longa senluna nokto sur nia tero — kune kun la suno brilas la steloj, multe pli elokvente ol ilin ekkonis tiu, kiu ilin rigardis nur tra la densa tavolo de la ĉirkaŭtera atmosfero. Ĉi tie ne ekzistas aero, nek akvaj vaporoj — kaj sekve jam en la unuaj momentoj post la detera ekstarto la estontaj vojaĝantoj adiaŭos kun la blua firmamento.

Je tio oni cetere alkutimiĝos. Sed kaptumiĝo sendube ekkaptos la homojn ĝis ili sur la malhela firmamento en najbareco de steloj kaj suno ekvidos eĉ sian naskiĝan planedon en formo de kvaronluno. Grandega rondvolvaĵo pendas sur la horizonto. Kiu pli longe atente rigardas, rimarkas, kiel sur ĝi iom post iom ŝanĝas sian formon kaj pozicion la nubokovrilo. De tempo al tempo el inter ili ekbrilas la helaj strukturoj de kontinentoj kaj polar-glacioj kaj glaciegoj de kiuj pli malhele respeguliĝas la oceanoj kaj maroj. Kaj jam eĉ per malforta triedro (teleskopo) sur tiu ĉi malproksima globo oni ekkonos pli grandajn lagojn, oni ellernos diskoni montarojn, serĉi kaj trovi, aŭ almenaŭ imagi la lokojn, kie troviĝas la malproksimaj arbaroj, rokoj, riveroj kaj herbejoj de la hejmolando.

Kun ĉio ĉi malgaje adiaŭos, tiuj, kiuj vojaĝos sur la lunon. Tie ekzistas nek vento nek fulmotondro, nek pluvo nek neĝo. Nur premiga, peza silento ĉirkaŭas la homojn. Varmego estas ĉie, kie sin apogas la suno, terura frosto tie, kie nur momenta ombro ĝin kovras. Dekmil krateroj (malgrandaj ĝis grandegaj, kun 100-kilometraj diametroj) kaj teruraj montoj donas al la regiono fantoman aspekton. Kaj ĉe piedoj de tiuj grandeguloj, el kiuj kelkaj superas eĉ la famajn Himalajamontegojn, troviĝas larĝaj ebenoj kun profundaj polvotavoloj.

Cetere sur nia bildo videbliĝas, kiel profundajn spurojn postlasas nur eta helptanko. Kaj pluraj tanketoj (1) kiuj iam eliris el raketoj, kiuj kiel unuaj startis sur la luno, kaj — el la tero direktitaj — ĉi tie entreprenis la unuajn esplorojn, nun solece staras sur la rando de la raketstartejo. Ili helpas ĉi tie okaze se startas provizaj raketoj (2) kiuj regule transportas de la tero sur la lunan bazon por interplanedaj flugoj nutraĵojn, pelmaterialojn kaj aliajn bezonaĵojn, kiujn la homoj tie bezonas por vivi kaj labori.

La luno estas tre konforma bazo, ĉar por superregi ia gravitacion de la luno sufiĉas nur unu sesono da energio necesa por suprenflugo de la tera surfaco. Pro tio estas ankaŭ avantaĝa rekte tie munti la grandajn, potencajn raketojn (3), kiuj transportados la homojn al aliaj mondoj. La estontaj universovojaĝantoj ĉi loke bone kaj ĝis la lastaj detalaj ekkonos la intelektan kaj komplikitan ekipaĵon de maŝinoj, kiuj dum longaj monatoj fariĝos iliaj hejmoj.


En la antaŭaĵo de la bildo estas videblaj, homoj, laborantaj je la raketo. Ili estas vestitaj en pezaj skafandroj (bildo 2-a), kiuj havas multajn taskojn. Unuavice ili protektas la homojn kontraŭ la temperaturaj cirkon-stancoj sur la luno. Ĉar tie ne ekzistas aero, la temperaturo ege ŝanceliĝas -de -150° C ĉe fino de la longa nokto ĝis +110° C kiam la suno troviĝas rekte super la kapo. Kaj krom tio la skafandroj devas solide sekuri kontraŭ diversa radiado — ĉefe kontraŭ kosma — kaj ankaŭ kontraŭ polvo de meteoroj; la homoj kunportos eĉ necesan kvanton da oksigeno, ili ankaŭ estos ekipitaj per miniaturaj sendstacioj kaj radioakceptiloj, por povi interkompreniĝi dum la laboroj (ĉar la sonondoj ne povas trapenetri la spasmon senaeran); la skafandroj devas esti tiel elastaj, ke oni en ili povu normale iri kaj labori. Kaj ĉar sur la luno regas tiom malforta gravitacio, estos necesaj botoj el sufiĉe peza materialo. Sed malgraŭ tio, ĉiu novulo spertos sur la luno diversajn malhelpaĵojn antaŭ ol li kutimiĝos eĉ tute etan movadon. Jes, ekzemple nur ordinaraj paŝoj ĉe uzo de kutima „surtera“ energio, tie ŝanĝiĝos en strangajn saltojn.

En la tempo, kiam la luno fariĝos solida bazo por pluaj flugoj en la universon, oni devos solvi ankoraŭ multajn problemojn, kiuj nun ankoraŭ turmentas eminentajn inĝenerojn kaj teknikistojn. La homoj havos al dispono alttensiajn motorojn kaj pelmaterialojn, tiel, ke la flugoj efektive ne estos tiom multelspezaj entreprenoj kiel oni nuntempe supozas. Malgraŭ ĉio necesos eviti ĉiujn su-

perflujajn vojaĝojn kaj kun ĉiuj materialoj altransportitaj de nia tero estos necese vere ŝpareme mastrumadi.

La luno mem en tiu tempo certe jam provizos nin per la necesa elektra energio. Sur la bildo oni vidas duon-cirkvit-bateriojn (4), kiuj kvazaŭ mekanikaj heliantoj (sunfloroj) daŭre turnas sian larĝan plataĵon laŭ la suno. Ili ŝanĝas ĝian brilantan energion en elektron, kiu estas kondukata en akumulatorojn (5). La tiel akirita kaj rezervita elektro poste servas ne nur por la necesaj bezonoj, sed ankaŭ por lumigado kaj hejtado en sciencaj laboratorioj kaj hejmoj dum la longaj lunaj noktoj.

Grava problemo estos la provizado kun aero. Kaŭze de malforta gravitacio aero entute ne povas sin teni sur la luno. Tial la laborejoj, loĝejoj eĉ la skafandroj estos hermetike fermitaj por ke nek minimuma kvanto de ĝi povu elpenetri kaj perdiĝi en la spaco de la universo. La ĉiutaga konsumo de oksigeno ĉe homoj estas sufiĉe granda — normala kaj sana homo eluzas en daŭro de 24 horoj proksimume 1072 g da karbooksigeno. Sed tio estas gaso danĝera por la homo. Tial necesos ĝin kemike ligi kaj poste — por ne bezoni daŭre transporti novan oksigenon de la terglobo — estos verŝajne en la estonto sur la luno instalotaj komplikitaj ekipaĵoj por renovigi la eluzitan aeron. Unu el tiuj aranĝoj videbliĝas sur nia bildo (6), estas grandegaj rezervujoj en kiuj oni kulturas akvoalgojn, kiuj male kompare al homoj, por sia vivo bezonas karbooksigenon kaj eligas puran oksigenon.



La kontakton kun nia mondo la estontaj lunoloĝantoj ne havos nur pere de raketoj. Ili kun ĝi regule kontaktos ankaŭ pere de radio kaj televisaparatoj. Precipe la televidon atendas granda estonteco. Ja la rilatojn elsenditajn-pere de forta luna stacio povos samtempe — sen iuj ajn transigaj stacioj — aŭskulti la homoj sur la tuta duono de la terglobo, kiu ŝus fruntas al la luno.

Neimageble valorajn inventojn jam donis la unuaj sovjetaj tersatelitoj, kiuj ebligis observi kaj studi aferaĵojn, kiuj estus al la homoj neatingeblaj. Sur la luno ebligos konstrui por la daŭro laboratoriojn ekipitajn de multe pli perfektaj kaj grandiozaj sciencaj aparatoj. Tute idealmaniere oni nekapablos aranĝi astronomajn observojn, multe pli ekzakte ol en la kondiĉoj de multnombraj intervenaj aferaĵoj, kiujn sur la tero ne eblas eviti nek en la altmontaj observatorioj.

La homoj establiĝos sur la luno; nombraj ekspedicioj transverse trapenetros la lunajn regionojn, ili kompletigos kaj pliĝustigos landkartojn kaj korektigos tiujn. Sendube oni sukcesos eĉ trovi sur la luno rimarkindajn mineralajn riĉaĵojn, plejdiversajn valorajn ercojn. Sur la bildo oni vidas eniron en minejtunelon (7) ĉe piedo de surluna monto.

* * *

La sopiro al pli bona kaj pli kompleta vivo gvidis la homaron sur ĝiaj ĝisnunaj historiaj vojoj. Tiu sopiro, kiun neniam ebligis satigi, kiu ĉiam antaŭsentas novajn sekretojn kaj novajn aferaĵojn, gvidos la homojn ankaŭ pluen. Ĝi gvidos ilin sur la lunon kaj proksimajn planedojn kaj iu tage ĝi malfermos al ili la vojon ankoraŭ pluen, al malproksimaj steloj kaj novaj misteraj mondoj.

K.S.

Kun la permeso de la aŭtoro, pentristo kaj redakcio, kiu afable pruntis la bildmatricojn el la centra organo de la Ĉeĥosl. Komunista Partio „RUDÉ PŘÁVO“ esperantigis:

Rudolf Burda

Postnoto: Laŭ plejlastaj informoj, sovjetaj scienculoj jam asertas, ke eĉ ne plu necesos uzi la lunon kiel saltbreton (bazon) por el tie atingi ceterajn planedojn, sed oni povos jam de la tero ilin atingi sen iu ajn interstaciado helpe atomenergio.

(La tradukinto)

PACO-cs-1958-02-04

LA AGITBAZO »LA LIBERA MONDO«

En la okcidentaj landoj oni ŝatas eŭfemismojn. Nun ne plu taŭgas la frazo „li estas senlabora“. Oni diru, ke „li estas „liberstarigita“. Simpatie kaj agrable, ĉu ne? Malriĉaj familioj estas nomataj **enspezmalfortaj** familioj. Oni ne parolas pri imperialistaj kolonioj. Oni diras nur **subevoluintaj** landoj. Kaj landoj en kiuj la grandfinanco havas la ekonomian potencon ne plu estas nomataj kapitalistaj sed liberaj landoj.

Sed kiel „libera“ estas la „libera mondo“ politike? La organizaĵo de la agresiva Atlantika bloko NATO donas la respondon. Ĝia principo nome estas, ke la malgrandaj nacioj devas subordigi sin al la pli grandaj. Tial Usono estas la efektiva dominanto en la tuta organizaĵo.

Karakteriza estas la sinteno de NATO — unuavice de la usonaj gvidantoj — kontraŭ Islando. Kiel konate, la islanda parlamento en 1956 decidis nuligi la kontrakton kun Usono pri la amerikana militbazo en Islando. Sed ĉu Usono interkonsentis? Tute ne. La NATO-gvidantoj en Usono komencis aranĝi furiozan kampanjon kontraŭ Islando. Oni prezentis la malgrandan landon kiel danĝeran minacon kontraŭ la paco. La kampanjo donis la rezultaton, ke daŭre usonaj trupoj devas resti en la lando. La NATO-bonzoj ne kaŝas, ke ili procedos same ankaŭ kontraŭ ĉiuj aliaj landoj, kiuj volus imiti la islandan ekzemplon.

La NATO-gvidantoj malpermesis al Sovetio aliĝi al la Atlantika bloko. Kaj tamen iaj okcidentaŭropaj politik-istoj asertas, ke NATO estas defensiva organizaĵo. Sed lupoj en ŝafaj feloj pli-malpli frue senmaskigas sin. Kaj ne estos eble por ĉiam kaŝi la veran sencon per eŭfemismoj.

Ulf Uggason

TELEGRAMO

La 10-an de februaro, kiam tiu ĉi eldono jam troviĝas en presejo, ankoraŭ en Budapeŝto daŭras la traktado pri nia II-a MEM-konferenco kaj estas espero, ke la koncernaj ofic. instancoj ĝin permesos. Tial ne eblas diri ankoraŭ precizan daton. En urĝaj kazoj vin bonvolu turni por informoj

rekte al k-do. Pŭl BALKANYI, Haraszt u. 33, Pesthidegkut, BUDAPEST-II, Hungario. Ce li an-kaŭ petu invitilon, kiu tian bezonas por ricevi vojaĝpermeson.

La redakcio

NEHALTIGEBLA STREBADO

La mondampleksa movado, kiu postulas ĉesigon de la kernarmilaj provoj fariĝas ĉiam pli ampleksa. Dum la lasta tempo aliĝis al ĝi multaj japanaj fizikistoj, la brita eklezia konsilantaro, socialdemokrataj kaj socialistaj gvidantoj en Italio kaj Kanado, multaj sciencistoj, kuracistoj kaj verkistoj kaj kun ili milionoj da ordinaraj homoj.

Sed la atombombaj strategiistoj sukcesis mobilizi kelkajn diletantajn fizikistojn, kiuj provas bagateligi la danĝeron por la homaro de la proveksplodoj kun atom- kaj hidrogenaj bomboj. Kaj samtempe oni insultas la protestmovadon.

Ekzemple la angla ministro por eksteraj aferoj, Selwyn Lloyd, kaj kun li multaj reakciaj ĵurnalistoj (ne nur en Anglio) ne povis elpensi pli bonan argumenton ol la jena:

„La agitado kontraŭ niaj provoj devenas precipe de la komunistoj.“

Nu, tio signifus, ke oni donas al la komunistoj tro grandan honoron, ĉar efektive la plimulto de la protestantoj ne estas komunistoj. Tial la dekanano John Collins en la S: Paŭlo-katedralo nomis la argumenton malinda. „Ĉar ĝi kombas ĉiujn per la sama kombilo — atomfizik-istojn, biologojn, pastrojn, la papon, Albert Schweitzer, patrinojn, kaj simplajn homojn - kaj kulpigas ĉiujn por esti komunistoj, komunistaj kunkurantoj, homoj trompitaĵoj de la komunista propagando“, ekplendis Collins indigne.

La semajna revuo Tribune (la laborpartio) kritikis la eldiron de Selwyn Lloyd kaj demandis ironie:

„Ĉu eble Selwyn Lloyd estas imuna kontraŭ stroncio?“

Nu, kernarmilaj aktivistoj faras kompletan eraron, se ili kredas, ke eblas splitigi la volojn al la vivo per mensogaj akuzoj, per angile glitemaj paroloj. La strebado al paco, maltensio kaj paca kunekzistado ne estas haltigebla.

A. Tumer

HUMORO KAJ SATIRO

Se oni kalkulas la aĝon de la Tero je dudek kvar horoj, tiam la homoj kunestis dudek sekundojn. Inter ili jam aperis mizantropoj, kiuj enuas kaj tial havigis al si ludilon, kiun ili nomas hidrogenbombo.

La kirasita pugno

La militdio: — Mi ne komprenas, kial estas tiel malfacile depreni la batalganton. Estas ja ĉiam facile surmeti ĝin.

Niĉjo

Oni jam parolis pri provizora libero kaj pri relativa libero. Nun temas pri kontrolita libero. Tre baldau temos pri katenita libero. Enterigo sekvos.

El „SAT-AMIKARO“ n-o 131.

Se mi donas al vi unu dolaron kaj vi donos al mi unu dolaron, ĉiu el ni ambaŭ havos unu dolaron.

Se vi donas al mi unu ideon kaj mi donas al vi unu ideon, ĉiu el ni havos du ideojn.

El „SAT-AMIKARO“ n-o 131.

SOLDATLETEROJ

La dioj de la kapitalo, la financreĝoj kaj la monopol-magnatoj. sidas sur siaj tronoj en neatingeblaj fortikaĵoj. Kun sardona rideto ili rigardas la svarmantajn soldatojn malsupre, kiuj batalas kaj mortas por iliaj interesoj. La dioj de la kapitalo nome scias fari oron el sango kaj larmoj de la suferantaj homoj, el amasmortigoj kaj ruiniĝoj.

Ĉiuj grandaj militoj, ekde la sieĝo de Trojo ĝis tiuj de Napoleono, havis poetojn, kiuj gloris ilin por venontaj gentoj. Sed koncerne al tio, nia tempo estas turnopunkto en la historio. La du mondmilitoj ne entuziasmigis la poetojn, ili entuziasmiĝis nur de la batalo kontraŭ la militoj kaj kontraŭ tiuj imperialistaj fortoj, kiuj okazigis ilin — batalo, kiu havas multajn formojn depende de temperamentoj, konvinkoj, konceptoj k. a.

Kiuj povas pli emfaze protesti kontraŭ la milito ol tiuj, kiuj vivis aŭ vivas en ĝi ? Pro tio la leteroj de la soldatoj al siaj karaj en la hejmlando ne povas teni nin indiferentaj. Estas tre valore por la afero de l'paco, ke tiaj leteroj estas kolektitaj kaj eldonitaj en formo de libroj. La esperantistoj jam konas la japanan esperanto-libron „Aŭskultu, la voĉojn de Oceanio!“ Kaj tuj post la fino de la mondmilito aperis libro el leteroj de germanaj soldatoj. Nun ankaŭ francaj soldatoj en Alĝerio aŭdigis sin. Iliaj leteroj estas publikigitaj kaj — kompreneble — malpermesitaj en Francio.

Inter la letterskribintoj la soldato Jean havas multe rakonti pri „la franca pacigo“ en Alĝerio. Li rakontas kiel la francoj senindulge torturas la alĝeriajn patriotojn kaj kiel tiuj, se ili transvivas la turmentojn, estas veturigitaj en la dezerton kaj mortpafitaj de de francaj mitraliloj.

Li plendas: „Mi lernis el la evangelio, ke oni amu la plej malriĉajn inter la malriĉaj. La evangelio instruis min, ke ĉiuj homoj estas egalaj. Kiel mi povos elteni tiun naŭzon, kiu estas nomata „la franca pacigo“?

Nu, leterprotestoj ne bridas la militorganizantojn. Ili ne povas aboli la ekscesojn en Alĝerio. Sed ili povas vekti la konsciencon de la homoj kaj instigi al aktiva pacbatalo. Tio estas, ke la pacamikoj suprenlevu la standardon de paco kaj interpopola frateco. Ili devas kolektiĝi kaj leviĝi brako en brako kaj sentime stari kontraŭ tia socio strukturo, kiŭ permesas la estadon de agresoroj, kiuj vivas laŭ la makiavela maksimumo „dividu kaj regu“ kaj tial ankaŭ atakas la „internan malamikon“ — la pacbatalantojn —, kies konsekvenca pacpolitiko ligas la manojn de la militorganizantoj kaj malfaciligas la eksplodon de nova milito.

Pecqueur

ĈU VI KONAS LA LANDON?

Kiel ĉiu atentema leganto de PACO konstatis, MEM nun havas peranton ankaŭ en Kamboĝo. Por multaj MEM-anoj tiu lando supozeble estas „terra incognita”. Ne mirige, ĉar nur kvar jaroj pasis de post la nova ŝtato Kamboĝo anstataŭis la pli fruan francan kolonion. En 1954 ĝi ricevis firman lokon inter aliaj sendependaj landoj en Azio.

La registaro de Kamboĝo faris multe por fortigi la ekonomion de la lando, por demokratigi la politikan vivon kaj kontraŭbatali la analfabatismon. La popolo havas voĉdonrajton ĉe kiu virinoj havas samajn rajtojn kiel la viroj. En Kamboĝo estas eldonataj 27 gazetoj en la kamboĝa, vietnama, franca kaj ĉina lingvoj.

La industrio en Kamboĝo ankoraŭ estas malforte evo-luinta. Sed la registaro faris aranĝojn por fondi enlandan industrion kaj ĝi dediĉis grandan atenton al la irigacio por plivastigo de la kulturareoj.

La registaro de Kamboĝo kaj la reganta partio — la Popolsocialista Komuneco — faras politikon de paco kaj kunlaboro kun ĉiuj landoj. Ĝuste tial ni ne dubu pri tio, ke la internacia lingvo Esperanto ricevos tiun lokon en la lando, kiun ĝi meritas, kaj ke MEM kaj nia gazeto „PACO“ ricevos multajn novajn amikojn en la juna ŝtato Kamboĝo.

N. T.-MEM-ano

ANTAŬULOJ AL MEM

„Esperanto kaj la Pacmovado estas gefratoj”. Per ĉi tiuj vortoj komenciĝis tiu telegramo, kiun Berta von Suttner, verkistino de la grava pacidea romano „**For la batalilojn**”, en la jaro 1909 sendis al la Dresdena Esperanto-Asocio.

Pli fru — en 1899 — la Unua Internacia Packongreso esprimis sin favore al proponoj, kiuj celis fondi movadon por la enkonduko de la internacia helplingvo. Sed ĝis la decido pasis longa vico da jaroj. Tamen, la afero jam ne plu malaperis el la tagordoj de la Packongresoj, sed ĝi, per la persisteco de Gaston Moch, kiu ludis gravan rolon tiel en la pacmovado kiel en la Esperantomovado, ĉiam denove ekaperis.

Gaston Moch lasis sin de neniam kontraŭstaroj erarigi. Li sukcesis atingi, ke la **13a Internacia Packongreso** en Boston (1904), decidis, ke la Internacia Pacoficejo okupu sin pri la afero de la internacia helplingvo. Sur la bazo de ĉi tiu decido la Berna Pacoficejo elektis s-ron Moch kiel referanton por la 14a Internacia Packongreso. Intertempe Moch klopodis varbi la esperantistojn por la pacmovado. En tiu celo li en marto 1905 aperigis en ĉiuj esperantogazetoj anoncon: „Alvoko al la fondo de Internacia Esperanto-Asocio por la Paco“. Tiu ĉi alvoko ne restis senrezulta. 6-an de aprilo estis en Parizo fondita la Internacia Societo Esperantista por la Paco. Oni akceptis regularon kaj decidis eldoni pacorganon por la esperantistoj. La redaktadon Gaston Moch prenis sur sin.

Moch samtempe turnis sin al ĉiuj pacsocietoj kun la postulo, ke ili uzu Esperanton por siaj korespondadoj. Dum kelkaj jaroj li akiris sufiĉe grandan nombron da aprobantaj respondoj. Tamen, kiam li en Luzern, dum la 14a Packongreso, prezentis sian raporton pri Esperanto kaj faris proponon por enkonduko de Esperanto en la packongresojn kaj en la korespondadon de la pac-societoj, granda plimulto rifuzis. Pro tio Moch komencis organizi la sendadon de petskriboj al la Berna Oficejo por akceptigi Esperanton kiel kongreslingvon en la packongresoj. Tio rezultis, ke dum mallonga tempo ne malpli ol 1.200 poŝtkartoj el 27 landoj subtenis la aferon. Intertempe ankaŭ la pacgazetaro pli kaj pli simpatie okupis sin pri la problemo. Ankaŭ pluraj naciaj packongresoj ofte kaj favore faris decidojn rilate al Esperanto.

Dum tiu tempo la esperantista movado faris grandan progreson kaj en la jaro 1907, okaze de la **16a Packongreso en München**, post kiam en tri internaciaj Esperanto-kongresoj jam pruviĝis, ke ĝi estas vere uzebla lingvo, la opinio de la pacamikoj tute ŝanĝiĝis. Kaj dank' al la kompreno kaj intereso de la prezidanto de la Propaganda Komitato, **Georg Arnhold** el Dresdeno, oni prezentis tri proponojn eksterordinare favorajn por Esperanto. Estis antaŭ ĉio efika la apogo de la famekonata granda scienculo **Wilhelm Foster** el Berlino. Kaj tiu efiko ne perdiĝis ĉe la kongreso, sed, spite de la plej arda kontraŭstaro de la prezidanto de la universitato, la tri esperantistaj proponoj estis helpataj per ĝi al la venko.

La unua propono esprimis la deziron por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn. La dua propono deziris akceptigi Esperanton por la Pacsocietoj kiel korespondan lingvon. La tria propono, prezentita de profesoro Förster mem, deziris, ke Esperanto estu kongreslingvo. Entute ĉio estis granda rezulto por nia afero.

Esperanto kiel kongreslingvo estis uzata unuafoje dum la 17-a Packongreso en Londono. Tie japana profesoro Kroita, kiu kiel delegito estis veninta al la Packongreso kaj al la Dresdena Esperanto-Kongreso, klarigis en sia salutparolo, ke nur la favora decido por Esperanto de la munchena kongreso pasintjara ebligis lian partoprenon en la londona kongreso.

La Internacia Societo Esperantista, fondita de Moch en la jaro 1905 por la pacifistoj, evoluis malrapide. Sed la plejparte nur de Moch redaktita revuo **Espero Pacifista** fariĝis baldaŭ la plej bona esperantorevuo. Kaj li krome kreis bibliotekon por esperantistoj. La kolektaĵo enhavis la plej gravajn pacifistajn verkojn.

Sed bedaŭrinde Moch ne trovis sufiĉan apogon de siaj samideanoj. Tial li devis ĉesigi la jam dum kvar jaroj aperintan revuon. Se ĝi nur estus ekzistanta ankoraŭ kelkajn jarojn! Ĉar ĉe la Esperantokongreso en Vaŝington 1910 oni decidis unuanime la revivigon de la **Internacia Societo Esperantista por la Paco ...**

Sukcesos por ambaŭ movadoj (la pac- kaj esperantista) — eĉ se ili ne estos kapablaj tute unuiĝi — man' en mano kunlaboradi.

D-ro jur. H. Arnhold, Dresden (Trad. hungara esp-istino el la germanlingva libro de la ila Germana Kongreso, Lübeck, 1911).

GRAVA PROPONO

Ĉiun jaron la Monda Pac-Konsilantaro proponas al siaj aktivuloj, honorigi la memoron de eminentaj famuloj, kiuj ŝatis la pacon kaj luktis por ĝi. En tiaj solenaj kunvenoj multaj homoj konatiĝas kun la verkoj de la honorigatoj kaj ili estas instigitaj mem agi tiel. La venonta jaro estos la centjara naskiĝtago de dro Ludeviko Zamenhof. Certe li indas, troviĝi inter la propona listo de la Monda Pac-Konsilantaro. Por ke tio estu, necesas, ke niaj kamaradoj el ĉiuj landoj postulu tion ĉe la sekretario de la Monda Pac-Konsilantaro kaj ĉe la sekretarioj de la naciaj Pac-Konsilataroj. Pripensu la grandegan propagandan valoron de tia decido por nia afero. Mi nur skizu la efikon en la Germana Demokrata Respubliko: En la unuopaj lokaj, uzinaj, lernejoj k. a. Pac-Konsilataroj oni sin okupas pri dro Zamenhof kaj Esperanto. En multaj lokoj esperantistoj sukcesos aranĝi Zamenhoffestojn en la nomo de Pac-Konsilataroj. Tio certe rompos la glacieron kaj kreos favoran medion por plua agado. Ĉar en multaj aliaj landoj certe estos simila, tial renturniĝus niaj klopodoj en tiu direkto. Ankaŭ nia konferenco en Aŭgusto en Budapeŝto sendu koncernan rezolucion al la sekretario de la Monda Pac-Konsilantaro!

L. Schödl, Neuruppin, Rosa Luxemburg-Str. 37

LA ĜOJO ĈE LA KARPATOJ ESTAS ANKAŬ LA VIA ...

Elpaŝo el pasiveco. Vidante la florantan esperantan pacmovadon en aliaj Popoldemokratioj kaj ankaŭ en Sovetio, samtempe la tristan situacion en nia lando, en oktobro 1956 mi decidis labori kun vervo por revivigi la esperantan vivon en **Rumana Popola Respubliko**.

Ricevinte la 57-an numeron de „La Pacdefendanto“ mi tralegis ĝin kaj tuj poste resumis ĝian enhavon en tripaĝan maŝinskribitan artikolon. Ĉi-tiun artikolon mi transdonigis al redakcio de „**Utunk**“ (Nia vojo). Ĝia adreso estas: Cluj, str. 6 Martie nr. 3. La titolo de la artikolo: „La lingvo esperanto en Sovetio kaj Popoldemokratioj“. La gazeto estas la oficiala organo hungarlingva de Verkistasocio kaj aperas semajne en ses paĝoj. La artikolon englutis la redakcio kaj en la nro 420/17.11.1956 ĝi aperigis kontraŭesperantan artikolon. Ĝi ne estas akra kaj finiĝas per demando: se Esperanto estus bona por ni, ĉu ĝi estus bona por ĉinoj kaj japanoj, kiuj ne estas indoeŭropaj popoloj?

Poste sekvis la ĉirkaŭrigardo en nia urbo kaj provinco. Mi faris kontakton kun la lokaj samideanoj. Ni ne estas multaj, la milito kaj la postmilitaj jaroj disigis nin. La unuan adreson de ĉefurbaj kamaradoj mi ricevis el Sofio (redakcio de N. Bulgario) kaj el Bucuresti ricevis adreson de samurbana k-do.

La unuan leteron eksterlandan mi ricevis de k-do R. Burda el Plzeň la 6-n de XII. 1956. Per ĝi, do el Ĉeĥoslovakio, mi ricevis la adreson de k-do Csapó Gyula, kiu loĝas en alia urbo de nia lando, kaj pluran tre gravan informon.

Paralele mi komencis la klerigan laboron per amika rondo ĉe la kompetentuloj. Kvankam nia urbo estas la dua urbo de la respubliko, tamen ĉe la lokaj organoj krom ĝentila akcepto nenion mi povis atingi. La ĝenerala respondo estis, ke oni studos la problemon kaj atendos ankaŭ la respondon de supera instanco el ĉefurbo. Pro tio mi ĉesis baldaŭ ĉi tiun laboron. Konturiĝis la neceso turni min al la ĉefurbo. Estis ne oble vajaĝi kaj restadi en la ĉefurbo.

* * *

Publika eliro sen preso. Por daŭrigi tamen la laboron kun sukceso, mi redaktis tripaĝon, maŝinskribitan memoradon

La unua parto priskribis la florantan esperantan pacmovadon ĉe niaj najbaroj kaj en la dua punkte mi faris la necesan proponon por malaperigi aŭ almenaŭ redukti la grandan kontraston. Poste mi donis resume la plej necesan konon pri Esperanto. En la kvara parto mi disponigis kelkajn datojn pri mi mem.

La memoradon mi sendis al Prezidanto de la Respubliko. Centra komitato de Partio, Ministerio de Instruo, Ministerio de Kulturo, Scienca Akademio de Respubliko, Universitatoj de la lando, Verkistasocioj ktp. Mi sendis entute al 35 komponentaj organoj en la ĉefurbo, Cluj kaj aliaj urboj. La plimulto de memorandoj estis sendita rekomendite, do restis atestoj.

Sur pala bazo fortkolora klerika laboro. En la tuta jaro de 1956 mi ricevis nur du informilojn: „La Pacdefendanto“ nro 57 kaj „Paco“ nro 34-35. Ankaŭ la tekston mi redaktis je ĉi tiuj du dokumentoj. Mi kompletigis ilin per malnovaj libroj kaj revuoj, plue per la dume alvenanta novembro numero de „Pollando“. Tiel mi rekomencis la interrompitaj vizitojn. Post kelkaj tagoj de forsendo de memorandoj mi vizitis la gvidantojn de la respektiva institucio menciante, ke la originalon mi sendis al ilia superulo en Bukuresto.

La lokaj gvidantoj jam pli favore rigardis la problemon, tamen konkretan rezulton ankoraŭ mi ne povis akiri. Eĉ male! La artikolo skribita por „Utunk“ estis sendita ankaŭ al ĵurnalo „Igazság“ (**Cluj, str. Jókai 16**), kaj al alia revuo en provinco, de kie mi ricevis negativajn respondojn.

Alian artikolon mi transdonis al revuo „Korunk“. Oni promesis, ke en la januara numero aperos ĝi. La revuo aperis, sed la artikolo mia pri Esperanto ne. Do ĉiun kaŭzon mi havis por malgajĝi. La vizitojn ankoraŭ mi daŭrigis. Mi komencis iĝi laca mov-ekspozicio. Vere estis malfacile suprengrimadi ĝis la dua, tria etaĝo kun manvalizo ĉirkaŭ 5 kilogramoj. Dume alvenis kelkaj poŝtkartoj kun kelkaj linioj en kiuj oni sciigas min, ke en la plano de kuranta jaro bedaŭrinde oni ne

povas lokon por Esperanto. Grincadis la dentoj: pri la 70-jara jubileo de Esperanto kaj pri la 40-jara datreveno de la morto de Zamenhof mi skribu nur en la venonta jaro pro la nedinamikeco de ilia plano ...

Penetras la unua radio de la verda lumo. La dentgrincadon mildigis la apero de artikolo pri Esperanto en la pacrevuo „Orizonturi“. Ĝi estas malgrandformata, rumanlingva revuo kaj enhavas sub la titolo „Esperanto“ artikolon de franca s-ano J. Dalet.

Alvenas la unuaj rekonaj. La 14-an de febr. 57 mi ricevis respondon de Instrusekcio de Urba Popolkonsilo Cluj.:

Popolkonsilo de urbo Cluj

Instrusekcio

Nro 3191/288/1957

Al

K-do Dr. B e i e r S á n d o r,

Str. Salcim nr. 12

C l u j

Ni sciigas vin, ke la Instrusekcio de Urba Popolkonsilo Cluj, studadis la memorandon prezentitan kaj la proponojn viajn por komenci kulturalan movadon pri popularigo de lingva esperanto.

Ni konsideras, ke tiel la memorando kiel la proponoj estas valoraj kaj samtempe indaj por esti studata de ŝtatorganoj, kompetentaj politikaj kaj kulturaj organizoj.

Ankaŭ la Instrusekcio okupiĝos pli detale pri la problemoj, prezentita de vi, se ĝi ricevos instrukcion de Ministerio por Instruo.

Cluj, 11. II. 1957

Ĉefo de Instrusekcio _ S. Török

Lernejinpektoro: A. Vizhányó

En ĝi oni nenion donas, sed la varmaj linioj de letero forgesigas la preskaŭ 5 monatan senrezultan lukton.

Depost kelkaj semajnoj alvenadas la leteroj de samideanoj el la plej diversaj lokoj de la landoj. Same alvenis kelkaj revuoj, riĉigantaj la dokumentojn por klerika laboro. La leteroj kaj revuoj kuraĝigas al plua laboro. Mi citas kelkajn liniojn el la letero de 8. III. 57 **de Freamat Stefan el Bukuresto**: „...antaŭ preskaŭ 3 semajnoj mi estis vokita ĉe la Asocio de Verkistoj (Uniunea Scriitorilor) kie, inter aliaj, oni montris al mi ankaŭ vian memorandon, kaj mi kaptis tiam la okazon klarigi al la sekretario de la Asocio diversajn problemojn koncerne Esperanton. Same, kelkaj el ni estis vokitaj al Institutul de Lingvistica, apartenanta al la Rumana Akademio, kie ni vidis denove vian memorandon. Ni grandvalore taksas vian klopokojn, ĉar tio pruvas, ke ni havas en vi fervoran samideanon, homo kiu dediĉas parton de sia vivo al Esperanto. Tiajn homojn ni bezonas, precipe nun kiam la perspektivo por nia movado estas sufiĉe favora.“

Dume alvenis ankaŭ la ĉeĥoslovaka eldono de la revuo „Paco“ nro 39-40 kun jena raporto:

Dro Beier Sándor en urbo Cluj sendis memorandon rilate Esperanton al la prezidanto de la Rumana Popola Respubliko dr. Petru Groza, al la Centra Partia Komitato en Bukuresto, al la ministerioj por instruado kaj kulturo kaj ankoraŭ al 21 aliaj instancoj. En la memorando li klarigas la altan valoron de Esp-o kaj la rolon, kiu ĝi jam ludas en la internaciaj rilatoj kaj en la monda pacmovado. Fine de tiu ĉi memorando li starigis praktikajn proponojn por krei ankaŭ en Rumanio oficialan pacmovadon kaj eldoni esperantlingvan rumanan literaturon. Ĉiuj tiuj instancoj estas petataj doni oficialan respondon. Rumanaj gekamaradoj sin trunu por detalaj informoj kaj kunlaboro rekte al D-ro Beier Sándor, Salcim 12, Cluj.

Ne forgesu aldoni p. m. por respondo.

La glacio rompiĝas. La 26. III. 1957 aperis artikolo de mi en la revuo „Korunk“ (Nia epoko). **La artikolo titolas: „Esperanto en la servo de la paco.“** Oni povas trovi la revuon en Londono ĉe: Collet's Multilingual Bookshop, 67 Great Russel Street, London W. C. 1. kaj en Nederlando: Pegasus Boekhandel, Leidsestraat 25, Amsterdam C. Tiu-ĉi artikolo estas la unua artikolo pri Esperanto de enlanda esperantisto (ĉar tiu aperinta en „Orizonturi“ estis skribita de franca k-do). La aperto de artikolo estas la rezulto de plurmonata laboro kaj havas glacirompantan karakteron.

Pri la artikolo **k-do Popescu Mihail el Bukureŝto** skribas en sia letero de 3. V. 1957 la jenan:

„Mi tre plezure ricevis, jam de longe, vian karan leteron de 29. III. Hodiaŭ mi ricevis ankaŭ la ekzempleron de „Igazság“ pro kiu mi sincere dankas. Mi tutkore gratulas vin pro via tre laŭdinda agado por la E-movado.“

„Jam tuj post via sciigo mi havigis la hungarlingvan revuon „Korunk“ kaj dum unu el niaj kunvenoj merkredaj mi tradukis ĝin rumanlingve kaj resume ankaŭ esperantlingve.“

„Antaŭ kelkaj tagoj mi skribis dankleteron (hungarlingve) al la ĉefredaktore. Samtempe mi esprimis la esperon, ke alia artikolo pri Esperanto aperos.“

Tre varmvoĉan salutleteron tripaĝan, kies kopion mi ricevis, sendis al la redakcio ankaŭ profesoro Teleki Józef el Odorhely-Székely-udvarhely. Ĝin subskribis 48 gekursanoj liaj kaj ĉ. 10 profesoroj mezlernejaj.

Paralele kun la ĉefurbo. La 5-an de I.1957 mi tradonis la memorandon persone en registrejo de Lingvosciencia Instituto Cluj kaj la 20-an de januaro 1957 al Akademio Cluj. Sekve la 19-an de aprilo 1957 la sekr. de Cluja Filio de Akademio RPR., k-do Constantin Negulescu, per telefono petis aŭdiencon por mi de akademiano prof. Dr. Emil Petrovici, kiu sin trovis en tiu momento ĉe la Lingvosciencia Instituto en Cluj. La respondo estis jesa.

Je la fiksita horo mi prezentis min en la akceptejo de la Instituto. Partoprenis ankaŭ sekcioĉefo Dr. Kelemen Béla, verkinto de la Granda Rumana-Hungara Vortaro (kiu aperos dum la kuranta jaro), Neescu Petru ĉeflingvisto kaj du aliaj personoj. Do 6 personoj entute.

Post rumanlingva interparolo mi estis invitata paroli ankaŭ esperante. La partoprenintoj rigardadis poste la dokumentmaterilon, montritan de mi. K-do Petrovici poste konigis la lingvojn: Volapük, Ido, Interlingua kaj aliajn. Menciis, ke inter ili nur Esperanto povas prezenti tiel riĉan sukceson pri kiu atestas la surtabla dokumentaro.

Oni promesis doni favoran referaton al la Cluja Filio de Akademio kaj respondon je mia memorando. Mi donacis specimenojn el revuoj „Pollando“ kaj „Nun-tempa Bulgario“ por la biblioteko de ĉi instituto.

La teksto de respondo, kiun mi ricevis post 2 semajnoj, la 3-an de majo, do post 4 monatoj de la prezento, estas jena:

Akademio de RPR
Filio de Cluj
Lingvosciencia Instituto
str. Racovita nr. 31. T 20-49
Nr. 233/1957
Cluj, 3. V. 1957
Al

K-do Dr. Beier Sándor

Rilate la memorandon, prezentita al nia Instituto, pri la akcelo de instruado de la lingvo Esperanto kaj vigligo de la esperanta movado, ni konsentas, ke la esperantaj rondoj povus formiĝi en la kadro de komitato por pacbatalo, eventuale en kadro de sindikatoj.

La eldonejo scienca povus kontribui grandparte al la ekiro de la Esp. movado per publikigo de vortaro kaj lernolibro.

Konsiderante la plantaskon de la Lingvosciencia Instituto plue la ŝarĝitan lernoplanon de la institucioj de supera instruado kaj mezlernejoj, ni kredas, ke provizore la kreo de katedro por la esperantolingvo, kunigo kaj publikigo de historio de la esp. movado kaj enkonduko de la lingvo kiel

lernobjekto en mezlernejojn ne estas problemojn severe aktualaj.

Direktoro:
Kelemen Béla

La 16-n de II. 1957 mi ricevis la informilon de 1. II. 1957 el Bukureŝto, laŭ kiu oni formis Inician Komitaton por Esperanto en RPR. La 23-an de IV. 1957 mi ricevis la alvokon de 15. IV. 1957 el Bukureŝto por formi Inician Komitaton ankaŭ en nia urbo.

„Igazság“ nro 101/28. IV. 1957. En la artikolo okaze de 40-jara datreveno de morto de Zamenhof, ĉe la fino de artikolo estas menciita **resume la esencaj punktoj de alvoko de leningrada junularo.**

La letero nro 4693/18. XII. 1956 de la redakcio „Igazság“, rifuzinta mian aŭtunan artikolon, sekvis post kvar monatoj sukceso. Nature ĉi tiuj kvar monatoj grandan kaj fortan laboron ensorbis. Do du artikoloj salutis nian formiĝon kaj tri gravajn presaĵojn havas ĝis nun ni en: Utunk, Korunk kaj Igazság.

Ni havos ejon por Esperanto-rondo. Je mia petskribo nr. 18.279/24. IV. 1957 subskribite individue por ricevi ejon por la esperanta rondo kaj eblecon teni kurson, la 16. V. 1957 mi ricevis jenan respondon de la Urba Popolkonsilo Cluj, Sekcio de Kulturo:

„Respondante je via petskribo nr. 18279 kaj aldonita memorando, kiujn nia sekcio studis kun konvena atento, ni informas vin, ke konsidere la konstante kreskantan gravecon de la instruado de lingvo Esperanto precipe antaŭ la VI. Festivalo en Moskvo, ni organizos esperantan rondon en la Kulturpalaco kaj se estus necesa ankaŭ en la kulturkluboj de nia urbo.

Cluj, 10. V. 1957

Ĉefo de la sekcio: Medan Virgil, Instruulo: Suceava Olga.“

Ne sufiĉas la esperanata presaĵo. Nia urbo ricevis nur 21 ekzemperojn el „Nuntempa Bulgario“ kaj povus aboni pli multe. Same estas la situacio pri la „Pollando“. Ĝis nun ni ricevis tri numerojn de „Nuntempa Bulgario“, sed la poloj ĝis nun eĉ la januaran numeron ne sendis al ni. Mankas lernolibroj kaj vortaroj. Krom la ĉefurbo estas kursoj en Odorhei-Székelyudvarhely kun la kursgvidado de profesoro Teleki József, kiu tre aktive laboradas. En urbo Oradea gvida kursojn malnova esperantisto k-do Vincze Ödön kaj Dr. Fejes László. En la urbeto Odorhei kontribuas al la movado ankaŭ aliaj tri aktivaj pacbatalantoj, profesoroj: Beger György, Hegyi Antal kaj Matéfi Béla. Kvankam en la urboj Sătmăre kaj Baia Mare ankoraŭ ne estas kursoj, tamen la senlaca laboro de k-do Csapó Gyula ne restos sen rezultoj.

La rumana Esperanto-movado fariĝas forta bazo de MEM. Ni komencis kun 10 abonantoj de „PACO“. Post nelonge ni plialtigis de 50 al 100, komence de jaro 1958 ni jam havas 250 abonantojn kaj en la mezo de tiu jaro mi esperas atingi la nombron de 500 „PACO“-abonantoj. Certe ni klopodos baldaŭ eldoni ankaŭ la unuan n-on de „PACO“ en Rumanio.

Por vekti la intereson, mi vizitis en la pasinta jaro 166 personojn aŭ kontaktis kun ili letere. Inter ili estas 27 akademianoj, universitataj profesoroj, 9 mezlernejaj profesoroj, 27 oficistoj, 15 verkistoj, redaktoroj, artistoj, 7 presoficejoj, 7 kuracistoj, 21 fabrikgvidantoj ktp. Sed krom tio mi vizitis ankaŭ universitatojn kaj plendis tie por enkonduko de Esperanto kaj mi esperas sukceson, se tiuj ricevos multajn salutleterojn de studentoj kaj profesoroj el alilandaj universitatoj, kie oni instruas jam la lingvon en katedroj aŭ kie ekzistas studrondoj. Skribu pri viaj spertoj kaj rekomendu al ili imiton. Multobligu vian leteron kaj sendu al jenaj adresoj:

Comitetul Central al Partidului M. R., Bucuresti, Rumanio.

Ministerul Invatamintului, Bucuresti, Rumanio.

Universitatea „Parhon“ Bucuresti.

Universitatea „V. Babes“ Cluj, Rumanio.

Universitatea „Bolyai“ Cluj, Rumanio.

Universitatea „I. Cuza“ Iasi, Rumanio.

Dr. Beier Sándor Cluj, Salcim 12.

La petitaj leteroj helpas al ni por enkonduki la lingvon universalan Esperanto en niajn universitatojn kaj eventuale en la lasta jaro de kelkaj mezlernejoj.

Do la koko krias ankaŭ ĉe la Karpatoj en la ĝis nun silentanta insulo de Orienteŭropo, Rumana Popola Respubliko

Permesu al mi esprimi mian dankon ankaŭ ĉi-voje, por la ricevita, ĝisnuna helpo (en kronologia ordo) al gekamaradoj: Rudolf Burda, Plzeň; Teo Jung, Scheveningen; prof. dr. Ivo Lapenna, Wembley; direktorino Varmaas, Rotterdam.

Per Esperanto por la Mondpaco!

Dr. Beier Sándor, Cluj, Salcim 12

LA EVOLUO KAJ NUNA STATO DE L'ESPERANTO-MOVADO EN LA GERMANA DEMOKRATA RESPUBLIKO

Ĝenerale konata estas la malhelpaĵo per la dekreto de 12/1/1949. Tiam ĉiuspecaj unuiĝoj kaj kluboj devis esti envicigataj en jam ekzistantaj demokrataj amasorganizoj. Escepte Esperanto, ĉar „ĝi ne estas kulture valora“, kiel oni asertis. Flanke de registaraj instancoj oni eĉ asertis, „Esperanto ja ne havas propran gramatikon, pro tio ĝi ja ne estas lingvo“.

Tuj dispartigis kaj disiĝis la esperantistoj. Nur malmultaj restus kuraĝaj, la plej granda parto malkuraĝigis, silentadis kaj obeadis. Iam post iam troviĝis kaj kontaktiĝis la seriozaj anoj. La batalo kaj lukto je agnosko komencis modeste post kelkaj jaroj. Dek aŭ iom pli fervoruloj konstante informiĝis pri la stato, pri la stato, pri iliaj agadoj, petskriboj, postuloj, kaj ties sukcesoj. Tiamaniere instigis unu la alian. Tiel evoluiĝis nia afero tute modeste. La nombro de fervoruloj iom pligrandiĝis. La aktivuloj de nia distrikto regule renkontiĝis, sed ĉiam en alia gastejo, fiksante la daton kaj ejon ĉiufoje por la sekvonta kunsido, timante esti arestataj. La evoluo montris, ke tiu timo estis senkaŭza. Post kelkaj jaroj, en oktobro 1955, mi kuraĝis inviti ĉiujn al mi konatajn iamajn esperantistojn. Estis preskaŭ 200 adresoj el Dresden kaj ĉirakaŭaĵo. Al la kunsido venis iom pli ol 40 personoj kaj entuziasmiĝis pri la favora evoluo. Tie ili aŭdis, ke la registaro deklaris jenon: La lingvo ne estas malpermesata. Ĉiuj interesuloj rajtas apliki ĝin kaj korespondi eksterlanden, se ili ne agas kontraŭstate. Sed ne permesate estas propagandi publike, fondi klubojn aŭ eĉ unuiĝon. Tamen la opinio de la registaro estas, ke Esperanto ne taŭgas en literaturo, scienco kaj tekniko. Laŭ tio Esperanto estas kaj restas senvalora, ĉar nenie ĝi konvinkis ĝian valoron.

La batalo daŭris. Ni postulis nuligi la dekreton de 12/1/1949, ĉar nia konstitucio permesas al ĉiu civitano fondi uniĝojn kaj asociojn se tiuj ne kontraŭas la leĝojn. Kaj laŭ la konstitucio estas jam nuligitaj ĉiuj iamaj dekretoj, kiuj ne akordas kun la konstitucio. Bedaŭrinde la respektivaj instancoj ne traktis la juran staton, sed ĉiam klopodis konvinki nin pri la netaŭgeco de nia lingvo. Pro tio ni nun turnis nin al la packonsilantaro. Post longaj debatoj kaj ampleksa korespondado konsentis la packonsilantaro, ke esperantistoj povas kunlabori. Sed ne estas celo, fari Esperanton la solan paclingvon! Tion oni aparte akcentis. Mi nun diris al mi, por povi labori en la kadro de mondpaco, kiel montris al ni la ĉeĥoslovakaj samideanoj, necesas, ke multaj esperantistoj kaj ne nur la fervoruloj eksciu tiun decidon. Presigi cirkuleron ne eblas en nia respubliko, ĉar ĉiu multobligiĝo, aŭ presita aŭ hektografita aŭ multobligita, ne eblas sen licenco. Kaj tiun ni ne ricevis. Pro tio mi alvokis kuraĝe al kunveno en historian urbeton Meissen apud Elbe. Tie partoprenis entute 54 personoj el 22 lokoj, de la ekstrema sudo ĝis la ekstrema nordo de la respubliko! Estis fruktodona kunsido, kaj la fervoruloj de la plej diversaj distriktoj konatiĝis. Tamen mi elpensis alian, efikan rimedon, diskonigi la novaĵojn al eble plej granda nombro de interesuloj. Mi serĉis en la respubliko volontuloj, kiuj konsentis kopii kaj dissendi leterojn je propraj kostoj. Mi aranĝis la tutan aferon kiel stafeto, donis al ĉiu tekston kaj adresojn, ke ĉiu loko ricevu minimume unu ekzempleron. La afero bone evoluis kaj kreskis iom post iom. Hodiaŭ atingas miaj Informiloj iom pli ol 300 lokoj post nur 2 semajnoj pere de 35 distribuantoj. Per tio ekflamiĝis la esperantomovado en ĉiuj anguloj de nia respubliko. Ĉie kaj ĉie kuraĝiĝis la iam timigitaj samideanoj kaj denove komencis batali por nia afero. Nun estis grave subtenataj niaj fervoraj kaj aktivaj unuopuloj en la diversaj distriktoj de la respubliko.

Sed tio verŝajne ne plaĉis al la kompetentaj instancoj. Oni kulpigis min esti fondanto de kontraŭleĝa organizo kaj malpermesis al mi pluen aperigi la Informilojn. Nur kun granda peno mi povas senkulpigi min, kvankam mi antaŭe ĉiam interrilatis kun la kompetentaj instancoj. Eĉ la ŝtatan sekurecoficon mi ĉiam demandis. Tio estis la bono por mi.

Intertempe helpis ankaŭ la eksterlando. Kompetentuloj de nia movado subtenis nian batalon per klarigantaj leteroj. La progresoj en la mondo, speciale en la popoldemokratioj, la belaj revuoj, la ekmemorpoŝtmarkoj en la popoldemokratioj ktp grave helpis al ni. La kontakto kun pacbatalantoj en la mondo, la kontakto inter la diverslandaj lernejoj bone efikis. Grava helpo al ni estas ankaŭ la sendaĵoj de lernolibroj kaj vortaroj el Germana Federacia Respubliko. Nun eblas al ni disvastigi la kono pri nia lingvo kaj gajni novajn adeptojn. Prefere la sovjetaj filologiistoj helpis per iliaj

prelegoj en Sovjetunio, kiujn ni eksciis per la sovjetaj samideamoj. La tradukojn sendis kelkaj nove trovitaj samideanoj al la gazetaro, kiu publikigis la tekston. Nun komenci vera atako kontraŭ la hezitantaj instancoj. La efiko estas kaosa. La unuaj instancoj ankoraŭ kontraŭstaras, apogante al la dekrete de 12/1/1949. Ili ankoraŭ nun asertas, pere de Esperanto havas agentoj kaj ŝtataj malamikoj la eblecon enpenetri kaj venenigi nian politikan vivon. La aliaj konvinkiĝis pri la taŭgeco kaj valoro de nia lingvo. Ili ne agnoskas la timon de la aliaj. Tiu stato supoze ne estas tolerebla kaj ni staras antaŭ gravaj decidoj. La racio diras al ĉiu serioza homo, ke la finvenko proksimiĝas en unu el la plej lastaj popoldemokratioj! Ni esperu!

Curt Kessler, Dresden GDR

POR ESPERANTO KAJ PACO

Por montri al certa aktiveco de unuopuloj en niaj rangoj kaj al ties vigla atentemo mi informas vin, kaj per viaj organoj ankaŭ la ceterajn gesamideanojn, ke s-anoj ĉefstudkonislisto D-ro Josef Ernst GÖRLICH, ĉefdelegito de UEA en Aŭstrujo, Walter MUDRAK, D-ro Adolf HALBEDL, KUTELWASCHER kaj **Mach** partoprenis la 4.-5.1.1958 en Wien konferencon de „Internationaler Versöhnungsbund“ (Internacia Ligo por Repacigo) kaj en konvenaj momentoj atentigis pri la ekzisto kaj interpaciga funkcio de Esperanto. Precipe s-ano Kutelswascher, nova adepto de ambaŭ movadoj, sciis elokvente akcenti la malperfektecon de ĉia klopodado pri la paco, se oni ne baldaŭ venkos la „obstinajn barojn“ de l'abunda lingvaro. Kvankam la kompreno de la ceteraj konferencanoj ne evidentiĝis, ĉi tiu interveno de celkonsciaj samideanoj tamen portos bonajn fruktojn, des pli, ke referentino konfirmis pro propra sperto la kunvenon de notinda nombro da diverslandaj esperantistoj en la kadro de la junulara festivalo 1957 en Moskvo.

Ĝojige ankaŭ estas, ke s-ro. Ernst SCHWARZ, ĉefo de presejo de Wien IX, Sensengasse 4, kaj eldononto de „Pax-Korrespondenz“ tuj deklaris sian pretecon, tie diskonigi ankaŭ komunikojn de esperantistaj instancoj. Ni esperu, ke ĉi tiu nova varbeblo estos profitigita de nia movado.

Iom malgaje mi sciigas pri la emeritiĝo de nia eminenta s-ano kort. kons. D-ro Kalo FRIEDEL en Graz kiel direktoro de la Stiria Landbiblioteko, en kiu li instalas atentindan E-fakon kaj aranĝis fakulajn E-ekspoziciojn. Ankaŭ en la sfero de Radio li helpis al ni al sukcesoj, estante mem sciencula paroladinto. Atinginte la aĝon de 65 jaroj li devis cedi sian postenon al pli juna oficisto, ĉar la koncerna leĝo ĉi tion destinas. Kvankam la ekzempla fervoro de nia altsatata samideano, la efika oratoro de nia festo la 8.9.1957 en Knittelfeld, ne malpliigis, ni tamen devas bedaŭri la perdon de tiel kapabla aktivulo en la vico de aktualaj oficistoj de la lando. Tial ni esprimu ĉi tie al D-ro Friedl ankaŭ publike nian plej koran dankon por ĉio, kion li faris por ni.

Dr. Adolf Halbedl, Aŭstrujo

NOVA ETAPO DE LA ĈINA ESPERANTOMOVADO

Instruado de Esperanto en lernejoj ne prosperis en Ĉinio. Antaŭe nur en 1921 ĝi estis instruata en tiama Pekina Univeristato, sed post nelonge tiu kurso ĉesis, kaj Esperanto neniam plu sukcesis enpenetri la lernejon. Sed ekde la dua semestro de 1957 Ĉina Popola Universitato, la novtipa ŝtata universitato fondita post la liberiĝo de Ĉinio, enkondukis Esperanton kiel nedevigan taskon en la ĵurnalisma fakultato. Tio estas rimarkinda eksperimento por pli grandskala enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Estas interese, ke en komenco multaj el la lernantoj lernis la lingvon skeptike. Ili lernis la lingvon, sed ne elektis ĝin kiel lernejan taskon. Tamen post kelkmonata lernado fine ili faris favoran decidon. Evidente la eksperimento akiris priman sukceson.

* * *

Okulfrapa progreso estas la reapero de „**El Popola Ĉinio**“, la gazeto longe sopirata de esperantistoj eksterlandaj. Dum preskaŭ tri jaroj depost ĝia ĉesiĝo Ĉina Esperanto-Ligo ja ricevis sennombrajn leterojn postulantaj ĝian reaperon. Nun tiu ĉi espero efektiviĝas, sed por ĝia plua kresko kaj disvolviĝo ĝi bezonas pluan subtenon de ĉiuj esperantistoj. Tium ĉi gazeton nun eldonas mem Ĉina Esperanto-Ligo, kaj ĝia enhavo pli taŭgas por esperantistoj. Laŭ petoj de legantoj ĝi fariĝas gazeto pli kultura. Krom la vivo de ĉina popolo, la novaj aspektoj kulturaj kaj ekonomiaj ĝi donas al la legantoj ankaŭ sciojn pri ĉina tradicia kulturo, informojn pri naciaj malplimultoj kaj kulturaj interfluoĵoj inter Ĉinio kaj aliaj landoj. E-movado en Ĉinio kaj leteroj de ĉiulandaj esperantistoj aperos ankaŭ en la gazeto. Tiel gazeto fariĝas ne nur gazeto pri ĉina kulturo sed ankaŭ gazeto de E-movado.

* * *

Multaj esperantistoj eksterlandaj vizitis Ĉinion en la unua jaro de la revigliĝo de ĉina E-movado. Pli ol 25 esperantistajn gastojn el 11 landoj akceptis Ĉina Esperanto-Ligo ekde decembro 1956 ĝis decembro 1957. Inter ili troviĝis sovietiajn specialistoj aŭ teknikistoj helpantaj socialisman konstruadon de Ĉinio, amikaj delegitoj de popolaj organizoj el aziaj kaj eŭropaj landoj, la speciala ambasadoro por Oriento de UEA, la „Vaganta Avino“, esperantista turistino el Nov-Zealando kaj la preterpasantoj tra Pekino por partopreni la festivalon en Moskvo aŭ por vojaĝi al aliaj landoj. Tio estas maloftaĵo en la historio de ĉina E-movado. Ili vizitoj multe akcelas la amikecon inter ĉina esperantista societa vivo. En la kunvenoj de Pekina Esperanto-Klubo okazantaj po du dimanĉoj oni ofte havis la feliĉon aŭdi raportojn aŭ paroladon de eksterlandaj esperantistoj.

* * *

En la lastaj jaroj la kultura interŝanĝo inter Ĉinio kaj aliaj landoj instensiĝas, la kontaktoj inter ĉina popolo kaj la popoloj en aliaj landoj oftigas. Tial la neceso de internacia lingvo pli kaj pli sentiĝas kaj la intereso por lerni Esperanton pli kaj pli grandiĝas. Malgraŭ la malfaciloj: nesufiĉo de spertaj esperantistoj, manko de taŭgaj lernolibroj por ĉinoj, ĉinaj esperantistoj kredas, ke ili venkos, ĉar ĉina E-movado ja ricevas subtenon de la kulturaj rondoj, kaj la malfaciloj estos venkitaj unu post la aliaj. Nun lernolibro de Esperanto taŭga por ĉinoj kaj nova vortareto estas kompilataj, eldono de aliaj Esperantaj libroj pri ĉina literaturo, scioj pri Ĉinio ankaŭ estas planata. Sub la subtenado de tutmondaj esperantistoj E-movado certe prospero en Ĉinio kaj ĝi ludos pli gravan rolon por akceli la interkomprenon kaj amikecon inter ĉina popolo kaj popoloj en aliaj landoj, kaj por propagandi la ideon de paca kunekzistado de malsamaj socisistemoj, kiu ja estas la plej praktika vojo por garanti la mondpacon.

Honfan, Peking

LA USONA BAZPOLITIKO

La konata usona komentisto Walter Lippman klarigis antaŭ nelonge, ke la „helpo al eksterlando“ fare de Usono celas i. a. subteni kaj elkonstrui la militistan bazreton ĉirkaŭ Sovetunio kaj la Popoldemokratioj. Lippman skribis:

„Oni opinias (en Usono), ke la registaro ĉiujare prenas ĉirkaŭ 4 milionojn da dolaroj de la amerika nacia enspezaro je la kosto de la vivnivelo de la amerikanoj kaj fordonas tiun monon por altigi la vivnivelon de ĉiuj popoloj sur la terglobo. Sed la vero estas, ke en la praktiko ĉiu mono estas uzata por subteni kaj kunteni la grandan militistan koalicion en kiu Usono estas la gvidanto kaj kiu ĉirkaŭas Sovetunion kaj Ĉinion. Tio, kion ni nomas eksterlandan helpon, estas la ĉiujara subtena al tiu sistemo de militistaj aliancoj, kiu estis fondita sub Truman kaj plivastigita kaj fortigita sub la reĝimo Eisenhower.“

Antaŭ la dua mondmilito Usono havis nur unu militistan apogpunkton de signifo ekster sia propra kontinento – Pearl Harbour sur Havajo. Hodiaŭ ĝi oficiale havas 950 aer- kaj flotbazojn – ili ne estas defendbazojn ĉirkaŭ Usono sed atakbazojn ĉirkaŭ Sovetunio kaj la Popoldemokratioj.

Karakterize estas, ke en Eŭropo elkreskis internacia kasto el paktpolitikistoj, kiuj solvas lokajn problemojn por la amerikanaj militstrategiistoj. Inter tiuj estas Paŭl-Henri Spaak, belga socialdemokrato kaj ministro por eksteraj aferoj. Li estas ĉefsekretario en NATO, kiu estas la plej granda agresiva militista organizo en la historio.

La usona revuo U. S. News and World, Report nomis la ĉefbazojn por bombataloj kontraŭ Sovetunio. Ili estas: Grenlando, Usono, Anglio, Francio, Maroko, Franca Maroko, Tripolio, Greklando, Turkio, Saŭdi-Arabio; hangarŝipoj en Mediteraneo; Filpinoj, Okinaŭo, Guamo, Japanio; hangarŝipoj en Pacifiko; Alasko.

Ankaŭ Hispanio ludas gravan rolon en la strategia rolo de Usono. Usono uzis pli ol unu miliardon da dolaroj por ekipi la armitajn fortojn de Franco. Reale Hispanio (kvankam ne oficiale) per sia militista pakto kun Usono estas membro de NATO.

En Italio troviĝas serio da usonaj apogpunktoj. Kaj Okcidentgermanio estas plena de usonaj militistaj konstruaĵoj. Okcidentgermanio estas unu el la plej gravaj almarŝteritorioj de NATO kaj la Hitler-generalo Hans Speidel estas ties ĉefkomandanto. Laŭdire atombomboj estas jam enmagazenigitaj tie kaj supozeble ankaŭ en ĉiuj plej gravaj de la preskaŭ 1.000 usonaj militbazoj

Ĉiu jaro, kiu pasas sen interkonsento pri malarmado kaj sen malpermeso de atombombaj eksperimentoj, ĉiam pli endanĝerigas la vivon de la homaro. La freneza vetarmado devas ĉesi, alie la rezultato estos nur unu kaj terurega.

Deŭkaliono

LA MALPROSPERO KOMENCIĜIS

En ĉiuj kapitalistaj landoj estas la ekonomiaj perspektivoj labilaj, ili troviĝas en „centro de malalta premo“, kiel la meteorologoj kumas diri en siaj veterraportoj. La produktado stagnas aŭ regresas kaj la senlaboreco kreskas.

La militindustriaj konzernoj trovas la elirejon el la ekonomiaj malfacilaĵoj per daŭra plifortigo de la armado. Ili asertas, ke tio povas malhelpi la redukton de la produktado kaj amassenlaborecon. Sed tia panaceo estas nur alkemista sorĉinfuzaĵo.

La militarizo ne povas malhelpi la krizon. La elspezoj estas kovritaj je la kostoj de plipezigitaj impostŝarĝoj. Sed plialtigo de la impostoj malpliigas la aĉetpovon de la laborulaj tavoloj kaj sekve de tio la debito de varoj ankoraŭ pli malpliĝas. La uzado de la produktadfortoj por fabrikado de armiloj estas malŝparo, kiu neŭ akriĝas la ekonomiajn malfacilojn.

La kapitalismo sin trovas e labirinto sen posedi la fadenon de Ariadne.

Akja

PACO KAJ NEŬTRALECO

Ekzistas jenaj du manieroj por konservi la pacon:

Komplete malarmado. (En tiu kazo milito ne estus ebla.)

Armita paco. (Kiu minacus la kontraŭulon, se li ne kapitulacius.)

Pri tiuj ĉi aferoj la homaro estas dividita en du grupoj, kiuj apogas aŭ la unu aŭ la alian manieron.

Tiu, kiu deklaras sin neŭtrala pri la dua maniero apogas per sia neŭtraleco la militinicianon. Tial tia neŭtraleco estas falsa. Evidentiĝas, ke rilate al paco kaj milito ne povas ekzisti neŭtraleco.

En mia lando – Ĉeĥoslovakio -iom post iom naskiĝis la ideo meti Esperanton en la servon de la paco, konforme al la programo de la Mondpaca Konsilantaro kaj la proleta internaciismo. Tiun ĉi ideon komencis realigi k-do Burda kaj fondiĝis la Mondpaca Esperantista Movado (MEM). Kaj La Pacdefendanto“, kiun li eldonis, faris bonan kontribuon por renovigi la esperantomovadon en la popoldemokratioj kaj Sovjetunio. Kaj nun la esperantomovado prosperas ĉie.

Sed daŭre troviĝas neŭtraluloj, kiuj volas pacon je ĉia prezo. T. e. eli preferus kapitulacion kun sklaveco ol fari reziston por defendi la liberecon. Necesas diri, ke tia kondutmaniere kontraŭas la principon, ke defenda milito estas justa kaj ke ataka milito estas maljusta.

Aliaj neŭtraluloj estas adeptoj de la „Esperanto-paco“. Sed samlingveco ne malebligas militon. Bolivio kaj Paragvajo, kiuj ambaŭ estas hispanlingvaj, estus militintaj unu kontraŭ la alia, eĉ se ambaŭ estus esperantlingvaj, ĉar magnatoj kaŭzas ilian militon. La lingvo Esperanto estas pacilo nur en tiu senco, ke esperantisto ne subtaksas alilingvulon. En la tempo de Zamenhof, Bjelostok – lia naskiĝurbo - donis multajn ekzemplojn de interlingva malamikeco.

En la hodiaŭo MEM havas la taskon enpenetriĝi Esperanton en la amasorganizaĵojn por tiamaniere ŝanĝi la neŭtralecan esperantismon al afero de la proleta internaciismo.

Josef Ballay, Brno, Ĉeĥoslovakio.

ILI ESTAS KONTRAŬ PACKONTRAKTO

La lasta indiantribo de Florida vivas en Everglades, granda marĉejo. Ili estas la lastaj restoj de la Seminolatribo, kiu nun nombras 820 indianojn. Ili vivas preskaŭ same primitive kiel iliaj praŭloj antaŭ centoj da jaroj kaj loĝas en pajlokabanoj. Sed tiuj ĉi indianoj akceptis tiajn novmodaĵojn kaj elektrajn kudromaŝinojn. La vilaĝo Seminola en la marĉejo estas vera turista logaĵo kaj kostas 60 cendojn por eniri la vilaĝon.

La indianoj ĉi tie vivas sufiĉe bone je la kosto de la turistoj. Kaj ĉi tiuj indianoj oficiale ne estas amerikaj civitanoj, ĉar la Seminola-tribo neniam volis paciĝi kun la amerikana registaro. Kvankam armisto nun regas inter la indianoj kaj Washington, tamen ne ekzistas packontrakto; kaj la batalhakilon ĉi tiuj indianoj eble neniam enterigos.

**MEM-ANOJ, HELPU NIAJN PERANTOJN VARBI NOVAJN ABONANTOJN AL NIA
GAZETO „PACO“**

JAPANAJ VOĈOJ PRI LA EFIKOJ DE RADIOAKTIVECO

Fakoj pri la dezertita influo de la radioaktivaj partetoj estas konataj ne nur per speciale faritaj eksperimentoj kun bestoj kaj vegetaĵoj. Montriĝis ekzemple, ke la atomeksplodoj en Japanio rezultigis, ke la rizo sur la kampoj ĉirkaŭ Nagasaki kaj Hiroŝima en pluraj kazoj tute aŭ parte perdis la kapablon reprodukti sin, ke ĝi perdis aliajn specikvalitojn kaj ke ĝi anstataŭ ricevis ĉiajn deformaĵojn, konstante hereditaj dum dek generacioj. Tiaj kreskaĵoj estas evidente malsuperaj al la komenca formo rilate al la produktado, rezistkapablo kontraŭ malsanoj kaj aliaj valoraj ecoj. Simila heredaj nenormalaĵoj estas malkovritaj en Japanio sur silkobombiksoj, orfiŝoj kaj aliaj organismoj, kiuj oni speciale esploris.

Estas ankaŭ konate, ke homoj el Nagasaki kaj Hiroŝima, kiuj ankoraŭ vivas kaj kiuj en 1945 estis elmetitaj al la efikoj de la radioaktiva radiado daŭre estas malsanaj kaj ke ĉe iliaj infanoj en unuopaj kazoj estas observitaj ĉiaj malnormalaĵoj. Tiaj infanoj frutempe naskiĝis kaj kreskis malbone. Multaj ankaŭ estas blindaj de sia naskiĝo.

Hiroo Ito

Pulmokancero pliiĝas en Hiroŝima

Laŭ statistiko de la publika sanoficejo de Hiroŝima-gubernio de 1950-1956, leŭkemio pliiĝis trioble kompare kun la tutlanda procento. Sed de 1954 ne pliiĝas leŭkemio sed des pli pulmokancero.

En la jaro 1950 la mortadkvanto pro pulmokancero (po cent miloj) estis 1,4 procentoj. Sen en 1954 ĝi estis 3,3; 1955 4,5 kaj 1956 7,3 procentoj.

La tutlanda kvanto de pulmokancero en la jaro 1956 estis 3,5 procentoj. Sekve la procento en Hiroŝimo estas duobla.

Korpa surradiado de radioaktiveco ofte kaŭzas leŭkemion dum enspirado de radioaktiva polvo kaŭzas pulmokanceron.

MEM-KLEG-ano

* * *

La teruraj priskriboj ĉi-supre koncernas nin ĉiujn. Ni loĝas en mondo kun diskrevigitaj atomoj kaj troviĝas amaso de enmagazenigitaj „prajmoj“, kiuj povas okazigi la plej katastrofan ĉenreakcion. La instinkto de memkonservo necesigas nin neniigi la kernarmilojn.

Sed ni ankaŭ postulas, ke la paca utiligo de la liberigitaj atomfortoj devas esti reguligitaj en moralaj normoj! Se troviĝas palpeblaj riskoj pri difektoj de radioaktiveca radiado, estus krime eluzi radiadon antaŭ ol krei sekuran ŝirmon kontraŭ ĝi.

En Usono estas malpermeso preparita kontraŭ geedziĝo inter la dungitoj en la atomlaboritorioj. Kaj, okaze de konstatitaj damaĝoj de radiado, estas laŭ la projekto prudente ordoni steriligon.

En la planado de tiu ĉi speco troviĝas respondeco, kiu sendube devenas de morala antaŭzorgo pri la kunhomoj kaj la posteuloj. Sed alia afero estas, ke tiu planado havas kriantan kontraston en la troplenaj hidrogenbombaj proviazaĵoj. Tiel longe kiel tiuj provizaĵoj ne estos sendanĝerigitaj regos la etiko de sovaĝulo, malgraŭ ĉiuj sciencaj progresoj.

La redakcio de PACO

ĈU PRO RADIOAKTIVECO?

Svedaj ornitologoj konstatis, ke certaj specoj kant-birdoj, kiuj kutimas flugi tre alte, ŝanĝigis sian triladon en grakadon. Oni ne povas klarigi la fenomenon sed divenas, ke ĝi povas dependi de

atombombaj eksperimentoj. La scienco eble povos klarigi la kaŭzon.

Imer, Svedio

PERSPEKTIVOJ

„En militkazo la nombro de viktimoj de hidrogenaj bomboj nur en Usono estos 82 milionoj ...“
(El prikalkuloj de s-ro Charles Shafer en la Kongreskomisiono de Usono pri la atoma energio.)

Onklo Tomaso

KONTRAŬ LA ATOMFRENEZULAĴO

Anstaŭe, tio estas ĝis 1914, la pacsopiro de la mondo estis limigita al necertaj kaj maloftaj manifestacioj platonaj.

La militoj okazis en limigitaj regionoj, sen dezertigi preskaŭ ĉiujn kontinentojn aŭ la tutan planedon; sen utiligi la lastajn eltrovaĵojn de la scienco por mortigi la homojn. Tiutempaj militoj ne postlasis tiom da vunditoj kaj kripluloj, ne tiom da domoj en ruinoj, kie la orfoj gratfosis per siaj manoj la cindron por ek trovi iom da pano bruligita, ne tiom da milionoj da tombejoj sur la batalkampoj, kie putris sub la tero la floro de junaj generacioj, kiuj estis pretaj ĝui la vivon, la dolĉan lumon de la suno, la bonfarojn de la civilizacioj kaj kulturo. Tiam mankis tia kruda eksperimento, kiu lasus sangajn vundojn en la koroj de milionoj da postvivantoj, kiuj priplorus inter la ruinoj almenaŭ unu karan mortinton, ofte infanon kun la ostoj frakasitaj pro aeraj bombadoj.

Hodiaŭ la popoloj estas konsciaj.

La du malfeliĉaj eksperimentoj de la imperialistaj militoj vekis novan konscion.

Anstataŭ preĝoj kaj platonaj pacsopiroj, kiuj antaŭe ŝvebis plej multe en la zono de la utopio, hodiaŭ la homaro imponas per sia pacvolo al la agresoroj, por ke tiuj ne plu detruigu la teron kaj ĵetu la homaron en abismon.

Ĉirkaŭprenitaj de atomfrenezaĵo, la cinikuloj de triamondmilito respondas per atomĉantaĝo.

En la momento kiam la scienco eltrovis la atomkrevigon ili minacas ekstermi ĉiujn, kiuj volas pace konstrui novan vivon.

Dum dek jaroj, post la senutila kaj terura demonstracio super Hiroŝima kaj Nagasaki, kie mortis kun senrespondeca kruelo dekmiloj da vivoj, ili minacis kaj minacas, praktikante la tiel nomatan „politikon de forto“.

Ili agitas la famenkonatan kaj murdantan atombombon. Ili imagas al si, ke eblas terursubpremigi la homojn de paco kaj de laboro per la hidrogenbombo, kiu havas miloblan eksterman potencon.

Por savi la homaron el sub „la politiko de forto“, la pacdefendantoj, kiuj estas plimulto, postulas pacon kaj malarmadon, postulas detruadon de la atombombo kaj la utiligadon de la atomenergio ekskluzive por la paco.

Ni, esperantistaj pacamantoj, deziras la pacon! Milito ne plu estu, ĉar la homaro en la XX-a jarcento deziras konstrui novan vivon en paco!

Nit'a Vranceanu, Medias – Rumanio

PRI NEOLOGISMOJ

En „Esperanto kaj kulturo“, n-ro 5, mi trovis la neologismon „skipo“ kaj pro tiu bona vortelektio mi tuj la sencon komprenis. En la glosoj estis tamen la klarigo: „Skipo“ - grupo de homoj kolektive agantaj por definita celo: nokta skipo en uzino, skipestro, futbalskipo, redakta skipo. (La kelkfoje uzata vorto teamo estas netaŭga pro sia formo: te-amo (!), kaj akcesore stranga rilate sian etimologion: la angla **team** prononcenda tim!“

Tutkore mi ĉion volas substreki kaj rekomendi la uzon de **skipo** anstataŭ **teamo**.

L. Schödl, Neuruppin

LA TAGLIBRO DE ANNE FRANK

Ne estas nekutime, ke junaj knabinoj skribas tablibrojn. Plej ofte tiaj taglibroj havas valoron nur por la posedanto. Tiel tamen ne la taglibro de Anne Frank. Ĝi nome estas kontraŭveneno kontraŭ la militarisma okcidentlanda literaturo kaj havas el diversaj vidpunktoj principan signifon ankaŭ por la pacesperantistoj. Tial ili ne povas aprobi la nerispondajn vortojn en i. a. strabe neŭtralaj esperantogazetoj, ke „Anne Frank restis kredanta en la interna boneco de la Homo“. Kvazaŭ ŝia taglibro estus „etika“ rezisto kontraŭ abstrakta „malbonaĵo“. Per tiaj vortoj oni nur forigas la konkretan kontraŭfaŝistan enhavon de la Taglibro.

Kompreneble la Taglibro de Anne Frank ne estas vera beletristiko laŭ artisma vidpunkto. Ĝi nome

enhavas jen infane naivaj frazojn jen maturajn kaj tragikajn. Sed eble ĝuste tial la Taglibro fariĝis objekto de psikologiaj esploroj kaj estas pritraktita en gazetartikoloj kaj dramaj verkoj. La Taglibro estas tradukita en dekkvar lingvoj kaj oni preparas eldoni ĝin ankaŭ en Esperanto ĉijare. Ĝi iĝis sukcesa teatraĵo kaj estas nun filmata.

La historio de Anne Frank datiĝas de la jaro 1933, kiam Germanio estis potencata de hitleristoj. La familio Frank, kiu estis juda, devis transloĝiĝi Amsterdamon. En tiu ĉi urbo naskiĝis Anne. Ka ŝi estis dekunujara, kiam la naziistoj invadis Holandon. Ili mortpafis komunistojn, arestis suspektulojn kaj pelĉasis judojn. La familio Frank devis sin kaŝi en mansardo. Kaj kiam Anne Frank iĝis 13-jara, ŝi komencis skribi sian Taglibron. Materialo ne mankis. Ĉirkaŭ ŝi regis furiozo kaj perforto. Kaj ĉiu tago kunportis tragikaj dokumentojn, kiel la jenan:

„Vesperon post vespero kuregas faŝistaj militaŭtoj tra la stratoj. Ili serĉas judojn. Ili rememorigas pri antikvaj sklavĉasadoj. Mi ofte vidas antaŭ mi vicajn da bonaj, senskulpaj homoj kun larmantaj infanoj, komandataj de paro da teruraj kanajloj. Batataj kaj turmentataj ili estas pelataj antaŭen, ĝis ili preskaŭ terenfalas. Neniu povas forsavi sin. Maljunuloj, etinfanoj, gravedaj virinoj, malsanaj kaj malfortaj homoj – ĉiuj devas partopreni en la mortodanco!“

Dum du jaroj Anne Frank skribis sian taglibron. Kaj sur la folio de aprilo 1944 estas legata:

„Mi vidas kiel la mondo iom post iom transformas en dezerton. Mi ĉiam pli forte aŭdas la muĝon de alproksimiĝanta tondro, kiu mortigos ankaŭ min. Mi sentas kompaton al milionoj da homoj, sed tamen ... mi kredas, ke ĉio reboniĝos, ke ankaŭ tiu ĉi krueleco finiĝos kaj ke paco kaj trankvilo denove regos en la mondo.

Tial mi devas teni miajn idealojn alte: dum tempoj venontaj ili eble efektiviĝos.“

Ŝi tamen kvazaŭ per doto de antaŭvidado skribis samjare, ke „oficiroj kaj generaloj celas post la morto de Hitlero starigi militdiktaturon, repaciĝi kun la aliancitaj potencoj kaj denove rearmi la landon por post 20 jaroj fari novan militon.“

En siaj lastaj vortoj Anne skribis, ke ŝi volas iĝi ĵurnalisto aŭ literaturisto. Ŝi bedaŭrinde iĝis nek unu nek la alia. La 4. aŭgusto 1944 naziistoj enpentrasis la loĝejon de Anne kaj arestis ŝin kaj ceterajn familianojn. Kaj en marto 1945 la hitleristoj murdis la knabinon Anne Frank en la koncentrejo Bergen-Belzen. Sed ŝian taglibron, kaŝitan en subtegmenta kamero en amsterdama postdomo, ŝia patro, savita el Aŭchwitz fare de sovjetarmeo, sukcesis trovi.

Nun ni skribas 1958. La faŝismo (naziismo) daŭre minacas. Hitlero estis nur el ĝiaj aperformoj. En sia esenco la naziismo estas sociala reakcio kaj konstantaj militprovokoj. Seninterrompa gardoservo tial estas necesa. La Taglibro de Anne Frank helpas la pacdefendantojn en ilia batalo kontraŭ milito kaj faŝismo.

Martin Münzer

ŜIRMO KONTRAŬ ATOMMILITO!

Necesas amasigi grandajn provizojn da biero en ladokaldronoj por anstataŭi trinkakvon okaze de atommilito, proponas serioze la usona sciencisto J. M. Sharf, kiu ankaŭ pledas por provizoj da manĝkonservaĵoj.

Sharf subtrekas, ke akvo kaj manĝaĵoj en natura stato veneniĝos de radioaktiva radioado dum atommilito. La savo do estus skatolmanĝaĵoj. Montriĝis nome, ke manĝokonservaĵoj en skatoloj senriske estas manĝeblaj, malgraŭ ke ili ĉe eksperimentoj estis nur 400 metrojn malproksimaj de la eksplodanta atomŝarĝaĵo.

Sed parolante pri nutraĵoj kaj atommilito oni devas konkludi, ke la malnova frazo „kanonoj kaj butero“ ne plu estas aktuala. Nun la demando temas pri tio, ĉu nia devo estas partopreni en la preparoj al memmortigo de la homaro per atom- kaj hidrogenaj bomboj, aŭ ĉu ni transdonos al la grandpotencoj mem decidi pri tio, kaj ĉu ni mem dediĉos nin al internacia agado de tute alia speco.

Ni scias, ke oni ne povas atingi pacon per terurigaj, militaj priskriboj. Ĉiuj ŝtatoj, ĉiuj ordinaraj civitanoj legis pri la teruraĵoj en Hiroŝima kaj Nagasaki. Kaj tamen la militorganizantoj preparas miloble pli teruran inferon. Ne sufiĉas revii pri venko de la bona volo en pacregno, kie lupoj kaj ŝafoj sin paŝtas kune kaj interparolas Esperanton inter la maĉaĵoj.

Multaj demandas sin, kial ĉiam pli da okcidentaj landoj armas sin aŭ intencas armi sin per atomarmiloj?

La respondo devas esti, ke la agresiveco de la usona imperialismo akriĝis. Kaj la usonaj armadmagnatoj, por sekurigi al si altajn profitojn dum multaj jaroj, enkondukis la atomarmilon en ĉiujn specojn de armilaro.

Kompreneble la usona imperialismo ne fabrikas tiajn modernajn armilojn por defendmilito sed por atakmilito. Ĝi senkaŝe indikis sian malamikon – Sovjetunion. Por tiu celo ĝi nun provizas siajn vasalajn ŝtatojn en NATO per atomkanonoj. Tio siavice signifas, ke tiuj landoj, kiuj lasas sin enterigi en la planojn pri preparoj de atommilito, trafos en ekstreme malfacilan situacion tuj en la komenco de la militeksplodo. Ĉar la atakata lando devas unuavice nenigi tiujn atombazojn.

Estas memkompreneble, ke la intensa atomarmado komplikas la internacian situacion kaj kreskigas la danĝeron de nova milito. Tial ĝi necesigas, ke la popoloj akriĝu la atentemon, forigu la batalon por la paco kaj strebu al efektiva malarmado. Jen la solaj vojoj por vanigi la planojn de la militorganizantoj.

„No pasaran“

En la tria jardeko la germanaj pacdefendantoj deklaris, ke Hitlero signifas militon. Ili pravis. Hitlero venis kaj kun li la dua mondmilito. Hitlero memmortigis sin, sed de liaj generaloj pluraj havas altajn postenojn en la okcidentgermana armeo. Ili havis daŭre nur unu celon, nome militon. Ĉar por kiu alia celo ili uzas siajn pene akiritajn demagogiojn Ĉu oni povas imagi al si artiston, kiu dum multaj jaroj perfektigis en pentrolernejo, posedanta penikon, tukon kaj farbokeston, kaj kiu tamen ne intencas fari pentraĵon?

Armiloj en la manoj de personoj, kiuj ne longe entreprenis la plej sangan hombuĉadon en la mondhistorio, estas mortiga minaco kontraŭ la tuta civilizita homaro.

Iu, kiu ne forgesis

LA BABELO PLIVASTIĜAS ...

En recenzo pri „Bantu Literature and Life“ skribita de R. H. W. Shepherd, Lovedale Press, kelkaj rimarkoj allogis mian atenton:

La aŭtoro prave konstatas:

„En la kulturo kaj lingvo de la Bantuoj ekzistas konservindaj valoroj, temas ja pri io unusola perdiĝo signifus perdon por la mondo ... Bantuaj lingvoj estas altnivelaj. Ili funkcias kiel efikaj komunikiloj de ideoj kaj samtempe ili estas riĉaj, malrigidaj, kaj elegantaj koncerne la esprimeblecojn Komparataj kun aliaj rasoj la Bantuoj vidigas admirindan rezistemon kontraŭ la ruinigaj fortoj de la moderna vivo ... Tial ŝajnas versimila, ke Bantuaj kulturoj kaj lingvoj kontinue vivo, eble ili eĉ denove ekfloros ...“

Je la fino denove la vortoj de la aŭtoro mem: „Estus erare supozi, ke nur en Afriko la homoj lukti por edukado kaj progreso“.

Mi ne konas la ceteran enhavon de la libro. Sed ĉi tiujn citaĵojn mi kiel pacbatalanto kaj kontraŭulo de ĉiuj superstiĉoj kaj antaŭjuĝoj (kiel rasismo ktp.) volonte povas substreki. Sed ĉi tiu maloftaĵo, ke blankulo parolas favore pri homoj apartenantaj al alia raso kaj precipe en Sud-Afriko, devigas min aldoni kelkajn konsiderojn:

Ĉu ni esperantistaj pacbatalantoj ne malatentas iomete en la nuna tempo de forta ekfloro de nia movado la mondiskalan strebadon de la nacioj kaj gentoj al pli alta vivnivelo, libero kaj memstaro, eĉ ekster la vicoj de kazoj plurfoje menciitaj en nia gazeto Paco?

Laŭ miaj spertoj (ĉar mi ofte funkcias kiel interpretisto) la vekiĝanta naciismo kaŭzas, ke anoj de iamaj kolonioj preferas uzi alian lingvon ol tiun de la estintaj mastroj, se ne eblas jam paroli la gepatran. Kaj tiu fakto sola multobligas la jam ekzistantan Babelon. Esperanto povus tiurilate kaj tiuokaze denove pruvi siajn kvalitojn, uzeblecon kaj utilon.

La jam liberigitaj nacioj (ekz. Indonezio, Hindio, Kamboĝo Laoso, Maroko, Tunizi, Egiptio k.a.) certe bonvenigus nian helpon diskonigi ties historion, kulturon, ekonomian kaj socian progreson pere de nia traduka servo.

Do, laŭ mia opinio, la nuna tempo ŝajnas esti sufiĉe oportuna por akiri la konfidon de pli grandaj

tavoloj de la homaro por la ideo de la internacia lingvo, ol ni sukcesi tion fari ĝis hodiaŭ. Necesas nur pli atenteme observi la evoluon, ne preteriri iun ajn maljustecon, laŭeble doni necesan helpon kaj subtenon kaj ĉiumaniere akceli mondiskalan interfratiĝadon pere de reciproka konatiĝo.

Ni ne malfruigu la okazon dum Babelo plivastiĝas ...

kata kano

Rim. Bantuo estas negra gento en Sud-Afriko.

PRI KIO PROPRE LA AFERO TEMAS?

Pro la dekjaraj ĝis nun senrezultaj malarmadaj intertraktadoj en la Unuiĝinta Nacioj ĉiu pacdefendanto de povas demandi sin: Ĉu Usono efektive estas preta sin deteni de kernarmiloj? La deklaroj de Dulles klare atestas, ke Usono bedaŭrinde neniel rezignos pri kernarmiloj.

„Estas la sama parolado, dissendita per radio kaj televizio la 22. julio 1957, Dulles diris denove:

„Kiam ni ellaboras niajn planojn, ni devas eliri el la premo, ke la nacioj, kiuj jam havas kernarmilojn, uzos ilin en milito“.

Kelkajn tagojn pli frue, la 16. julio 1957, li deklaris ĉe preskonferenco:

„Ni ne volas, ke la atomarmilo ĉesos ekzisti“.

Ĉe la sama preskonferenco li konfesis, ke Usono opinias, ke la atomarmilo neeviteble estos uzata en venonta milito kaj ke Usono kaj ĝiaj aliancanoj rapidigas la preparojn por la uzado de kernarmiloj.

Kaj la 25.8. lid iris en radio- kaj televiparolado, ke la „defendo de la A-pakto iom post iom devas esti fortigita tiel, ke ĉiuj aliancanoj de Usono estu provizitaj per avancitaj armiloj“.

Tiuj ĉi malkaŝaj deklaroj de Dulles tute ne permesas dubon pri kiu kulpas, ke la kernarmiloj ankoraŭ ne estas malpermesitaj kaj neniigitaj.

Estas konekse kun tio notinde, ke Sovjetio en ĉiuj siaj malarmadaj projektoj ĉiam kaj decime postulis kaj proponis, ke la kernarmiloj estu malpermesitaj, ke la produktado de ili ĉesu kaj ke la jam ekzistantaj provizoj de tiaj armiloj tute kaj plene estu neniigitaj.

Deŭkaliono

Ludvík AŠKENAZY:

KIEL ONI ŜTELIS LA LUNON - Rakonto pri fenomeno en geofizika jaro -

Homoj ŝatas la Lunon, ne sciante kial. Vespere ili levas la nazon al la ĉielo, kaj dum profunda spirado ili proklamas: „Ha! Kian belan veteron ni havas hodiaŭ vespere!“ Poste ili plue diradas, ke la Luno lumas kiel oro aŭ brilas kiel arĝento. Sed ne unu el tiuj iam pensi sunu solan fojon, ke la Luno, por teni sin pura kaj konservi sian belan brilon, devis lavi kaj bani sin. Nur Filipino kaj Laŭrenco, du sentimaj buboj, estis tion suspektantaj. Kaj neniu imagus tian aferon iliaflanke. Verdire, ekzistas ankoraŭ multaj homoj, kiuj ne kredas ilian historion.

Filipo kaj Laŭrenco estas du sentaŭguloj, kies egalulojn oni trovas ĉie. Ili vivas en Verdamaso, eta vilaĝo, kies piedoj trempiĝas en la lageto Kano, samtempe verda kaj blua. Ili ne tre bone kondutas en la lernejo. Sed ili ne estas malbonaj diabletoj. Kompreneble, ili ne tro ŝatas la matenan kombadon, kaj iliaj haraĉoj pli similas sovaĝan arbaron. Ili timas nenion de ili nekonatan aŭ konatan; kion ili plej timas estas la sidvanga frapado en la hejmo, la diktado en la lernejo kaj la maljuna Judao en la vilaĝo. Krom tio, ili estas persistaj fiŝkaptuloj, kiuj ne malŝatas la plej etan gobion.

Kaj unu tagon, kiam niaj du civitanoj sidis ĉe la rando de la legeto, duonobservante la fiŝfadenan korkon, subite li vidis el la arbaro elirantan specon de hometo, kiu iris al ili. Li havis dikegan kapon, tute rondan kaj orumitan. Kaj oni povis aŭdi lin murmuranta per milda kaj delikata voĉo. Scivoligitaj, Filipino kaj Laŭrenco sin enŝovis inter la kanoj, malgraŭ la herboj, kiuj tiklis al ili la nazalojn, por provi vidi, kion faros la hometo kun orumita kapo.

Tiu ĉi alproksimiĝas al la akvorando, eksidis kaj trempis siajn piedetojn en la freŝan akvon. „Ha!“ li ekkriis, „kiel agrabla estas la akvo! Kiel multe mi naĝos. Poste mi lavos min. Kaj neniu Terano povos diri, ke mi ne estas pura ...“ Kaj per unu fojo li eltiris sian orumitan kapon kaj ĵetis ĝin en la

akvon. Delikata krispiĝo trairis la ondetojn. Kaj oni povus kredi, ke estis la Luno, kiu trempis sin.

„He, diru!“ ekkriis Filipino, „estas la Luno, kiu banas sin ...“

„Ja vere,“ respondis Laŭrenco, „kaj kian ŝancon ĝi havas! Ĝi lavas al si nur la kapon. Por ni tio ne estas sama afero!“

Kaj jen la orumita kapo ruliĝanta sur la bordo. Tiam, oni ne scias ekzakte de kie, ŝprucis la Blua Nebulo, ĝi envolvis la kapon kaj ĝin viŝis. Poste, kiel pupon ĝi kunportis ĝin al la eta korpo, kiu removiĝis.

„Dankon, Nebulo“, diris la Ora Kapo. „Ĉu la vetero estos bela morgaŭ aŭ nuba kun intermitaj pluvoj?“

„Tute ne, kara mia“, diris la Nebulo, „ni aranĝis por vi mirindan plenlunon.“

„Nebulo“, demandis la Luno, „ĉu vi ne aŭdis tion el la radio?“

„He ne, tute ne, mi scias tion el bone informitaj rondoj!“

Nu, la Ora Kapo ekkantetis denove per sia voĉo milda kaj delikata:

„Mi estis olda (*) Luno

Mi estas nova Luno

Mi estos olda Luno

Kaj denov` poste nova Luno.“

„Sciu, Filipino“, diris Laŭrenco, „ni ĵus vidis la Lunon sin bananta. Kaj mi, mi deziras iam embuske ekatendi kaj kapti ĝin en nian fiŝreton Filipino, kio okazus poste, laŭ vi?“

La ideo estis tiel alloga, ke ili ekpreparadis grandan reton kaj atendis la nokton de antaŭ la baldaŭa Luno. Kiam la momento estis veninta, ili enŝovis sin inter la kanojn kaj atendis la alvenon de la orkapa hometo.

Kiel pasintfoje la Ora Kapo denove eksaltis petole, balanciĝis sur la ondoj, faris mil petolaĵojn kiel la Luno kutimas fari, foje platiĝanta kaj foje longiĝanta fandaĵo el oro ...

Ambaŭ niaj buboj atendis ĝis la Ora Kapo alvenis apud ili. Kaj per unu fojo ili ekĵetis sian reton. La Oran Kapon ili kaptis. Ili tiris ... kaj rulis la Lunon en groton trans la Karbardaja Monto. Ĉar estis malvarme kaj malsekeco ŝvitis el ĉie, ili faris por ĝi liton per sekaj herboj kaj musko. Kaj poste ili foriris ferminte la enirejon per dika ŝtonoj.

Post tiu ĉi heroaĵo, ili rehejmeniris, enlitiĝis kaj falis en profundan dormon.

Ĉiutage ili venis por rigardi sian kaptiton. Kaj ĉiutage la Luno diris al ili:

„Lasu min eliri. Certe oni jam serĉas min!“

„Kiu do povus serĉi vin“, respondis Filipino. Neniu rimarkis vian malaperon!“

Tamen, strangaj aferoj subite okazis en la Mondo. Jam la unuan nokton la estro de la Oficfako de luna kartografio ĉe la observatorio Mount Wilson en Kalifornio konstatis, ke je la 11h 35, la Luno ne aperis sur la ĉiela arkaĵo malgraŭ bona videbleco.

La fiŝkaptisto Olaf Erikson, kiu pace vivis en sia naskiĝa fjordo, konstatis en la antaŭtagiĝo, ke la vojo kondukanta al la najbara vilaĝo estis tute seka, malgraŭ la alfluo. Tre subtile li konkludis le tio, ke io stranga estis okazinta. Kaj ĉar li kutimis ĉion imputi al la Aŭtoritatularo en Oslo, li ekblasfemis kolere. La sekvantan tagon li kun du aliaj fiŝistoj tute simple petis la reĝon, perletere, restarigi la alfluan.

La malapero de la Luno kaŭzis la plej granda miron al profesoro Karpenko. Tute kviete li estis preparanda sian unuan flugadon al la „Astro de la Noktoj“. „Kiel okazis tio“, li diris al sia asistanto, „ke la Luno povis malaperi, kiam mi ankoraŭ ne estas sur ĝi? Ĉu vi ne havas la impreson, ke tio estas aranĝita artifaĵo?“

Ĉie regis eksciteco.

En Vieno, ĉe la Muzeo, la noktgardisto mirkonsternis, kiam li vidis la Lunon malaperanta el la famaj lunaj scenoj de l'Piepenhagen. Tio malesperigis lin, ĉar por la unua fojo io malaperis dum lia deĵoro. En la mateno li decidis informi la direktoron:

„Sinjoro, mi bedaŭras anonci al vi, ke ĉiuj lunoj sur la pentraĵoj de Piepenhagen malaperis. Mi provis mem pentri unu, sed ĝi aspektas kiel piro ...“

En Prago akre doloraj scenoj okazis ĉe la Nacia Teatro. Dum la prezentado de Niksino, de Dvořák, ĵus kiam la fama kantistino Maria Negratulino ekkantis sian grandan arion: „Ho, Lun` en profunda

ĉiel' ..., oni vidis la dekoraciojn ekstremitaj kaj la Lunon el papero forflugi. Rigardantoj, kiuj jam konis la dramon novelon, ekploregis kaj verŝis larmotorentojn.

Sed en Verdamaso la okazaĵoj sekvis alian tendencon. La urba estraro kunvenis en eksterordinara sesio. Kaj post longaj horoj de interkonsiliĝo sekvanta avizo estis afiŝita sur la pordo de la Urbodomo.

„Avizo al la libertempuloj! Sekve de la malapero de la Luno, la fungoj ne kreskos. Estas do senutile iri en la arbarojn. Plie, la urba estraro rememorigas siajn administrantojn, ke la arbaroj estas la pulmoj de nia Patrio, kaj ke ili pro tio ne estu malpurigataj. Tion diskonigu!“

Vespere neniu hundo plu bojis. Ĉiuj atendis senpacience la revenon de la Luno. Sed ĉar ekzistas sed-o, plej senpacience atendis ĝin loge afabla fraŭlino de Verdamaso. Ŝi havis rendezuon kun sia amanto je la plenluno, malantaŭ la Karbardaĵa Monto. Nenion da luno, neniom da amanto. Kun malĝoja koro ŝi promenadis en la nigra nokto, kiam ŝi subite ekvidis arĝentan radion.

„Luno, luno, kial vi ne lumas?“

„Mi lumas tiom, kiom mi pvas“, respondis grumblema voĉo.

Nia junulineto estis timigata. Sed ŝia amo donis al ŝi la kuraĝon: „Luno, kion vi faras tie?“

„Ts, diru nenion, faru kiel mi, kiu konservas ĉiujn sekretojn. Liberigu min, mi malfruas.“

Aŭdante tiujn vortojn, nia junulineto sentis, ke la espero revenas. Ne provante kompreni kiel la Luno estis enkarcerigita, ŝi streĉis sian tutan forton por ĝin liberigi. Febre, unu post la alia, ŝi forportis la pezajn ŝtonojn, kiujn la buboj estis amasigintaj antaŭ la aperturo de la groto. Ŝia koro batis freneze kaj ritmigus la amdolĉan kanteton.

Tuj kiam la junulino estis tirinta la Lunon el ĝia malliberejo, ĝi sin ĵetis la lageton, kontrolinte, ke Filipino kaj Laŭrenco ne estis en la ĉirkaŭaĵo. Kaj ĝia milda lumo disverŝiĝis sur la Mondon.

(Eltirita el „La Vie Tschecoslovaque“ N: o 5, 1957, Trad. Ŭo-Ĵo laŭ franca traduko de Paŭl Lecler.)

Sovjeta scienculo:

FLUGI SUR LA LUNON ESTAS JAM HODIAŬ EBLE

„Jam nun estas teknike eble atingi la lunon pere de raketo elsendita de la tero“, proklamis en gazeto „Pravda“ profesoro K. Sergejev en artikolo pri studado de la kosma spaco.

La sovjeta scienculoj skribas, ke estus tre interesa konstrui sur la luno konstantan kosmostacion. Tio kompreneble postulus pliperfektigon de la raket-tekniko, plialtigon de energetikaj eblecoj kaj evoluon de la kosmaj flugoj. Eluzi la naturajn riĉaĵojn de la luno kaj konstrui sur ĝi memstarajn atom-energetikajn sistemojn estas tre alloga afero. Supozeble en la estonto la luno fariĝos la ĉefa interstacio kaj kvazaŭa saltbreto, servonta al la vojaĝoj inter nia terglobo kaj la universa spaco. Krei tian interstacion sur la luno, sur kiu en vasta mezuro daŭrigus la sciencaj esploroj de la universo, nepre postulas kreon de interplanedara stacio, simila al la artefarita satelito de la terglobo.

Profesoro Sergejev rimarkigas, ke similan stacion jam proponis kaj motivigis Ciolkovskij. Ĝi estus konstruota en alteco de 2 – 3000 km super la terglobo per unuigo de la lastaj etaĝoj el kelkaj kosmo-raketoj. Se tiu stacio sin turnadus ĉirkaŭ sia propra akso, ebligus krei artefaritan „teran“ gravitacion, tiel, ke homoj tie povus tute normale vivi kaj labori. La kontakton kun la terglobo povus prizorgi specialaj raketoj, kiuj transportus homojn, materialojn, hejtrezervojn kaj ĉion ceteran, kion oni sur ĝi bezonus. La eluzo de la suna energio ebligus kulturadon de plantoj kaj legomoj sur la interplaneda stacio por ĝiaj loĝantoj.

La nuntempa evoluo de energetiko, kiel akcentas profesoro Sergejev, ebligos solvi ĉiujn tiujn problemojn jam en tute proksima estonto.

El „RUDÉ PŘÁVO“ tradukis **Rudolf Burda**, ĈSR

PSIKOLOGIO POR LA AGRESOROJ

Montriĝis laŭ esploro de usonaj psikologoj, ke inteligentaj soldatoj batalas plej bone kaj stultaj militistoj estas timemaj. Surbaze de tiu ĉi esploro estas stultulo kaj perfortulo saĝa viro.

Kaj laŭ la esploro tiuj, kiuj plej bone batalas ne nur estas la plej inteligentaj, ili ankaŭ venas de monhavaj hejmoj kaj havas solidan lernejan scion. Oni ne dubas pri tio, kiam oni memoras puĉraportojn el Little Rock en Arkansas. Tie kiel konate montriĝis, ke la inteligenteco sidis en la pugnoj. La usonaj psikologoj certe staris sur sia ĝusta loko, kiam la kruda amaso de „blankuloj“ ĵetegiĝis sur la negrogejunulojn.

La scienco estas mobilizita ne nur por konstrui novajn ekstermilojn. La psikologia militado estas same grava. La usona popola volas pacon. Ĝi jam estis laca de la milito en Koreio kaj ĝi ne volas novan nek tie nek aliloke. Sed necesas ĉesigi ĝian pacvolon, opinias la agresoroj. Kaj por tiu celo eĉ povas taŭgi „scienca esploro“, ke ju pli saĝa oni estas, des pli bone oni batalas. Nur sultuloj kaj cedulaĉoj povas interrilati en konkordo.

Ĉar la vekinto de tiuj ĉi linioj estas pacama, li do estas stulta, laŭ la koncepto de la usonaj psikologoj. Sed tiel ne estas la NATO-generaloj. Ili estas saĝaj kaj kuraĝaj, kiam ili provas elvoki brutalecon inter la junularo por ke ĝi fariĝu volema kaj sensenta kanonfuraĝo. Tia abomena venendisvastigo estas subtenata de ĉiuj ŝtatestoj, kiuj anstataŭ paca kunekzistado volas „malvarman“ kaj „varman“ militon por „montri sian inteligentecon“.

Cirano

BESTAMANTA LANDO

Oni ne tretu sur hundojn. Oni ja povas esti mordita, aŭ, se oni loĝas en Anglio, oni povas esti kondamnita al unumonata malliberejo. Angla ĝentlemano povas partopreni vulpĉason, li rajtas mortigraĵdi ĉevalojn kaj mortkurigi hundojn per elektraĵ leporoj. Tio atestas pri bona edukado kaj alta klero. Sed li ne rajtas treti sur hundojn.

Antaŭ nelonge sidis maljuna sinjoro en Hyde Park en Londono kaj legis ĵurnalon. Eble li legis pri la hombuĉado en Cipro aŭ eble bildo pri senhejmaj egiptaj infanoj falis al li en la okulojn. Eble notico pri angla teroro en Kenio kaptis lian intereson. Neniu scias. Ĉiuokaze, la ĵurnalo tute absorbis liajn pensojn.

Subite ludema melhundo buŝkaptis la pantalonkruojn de la viro. La viru eksurpriziĝis kaj hazarde li ektretis sur la hundeton, kiu ĝemante forkuris.

Atestantoj konfirmis, ke la viro kolere ekkriis kontraŭ la hundo, ke li stariĝis kaj tretis sur la hundon.

La 66-jara ĝentlemano estis kondamnita al ses-semajna mallibereco. Lia nomo estas publikigita en la tuta angala gazetaro kaj la hundido, kiu atentis la nomon Sailor, ricevis sian bildon en la ĵurnaloj.

Oni ne tretu sur anglajn hundojn. Troviĝas aliaj manieroj por esprimi la agresojn. Oni ja ekzemple povas vojaĝi al Cipro kaj sur la insulanojn tie aŭ treti sur la loĝantojn en Gujano. Tiuj, kiuj ne volas vojaĝi tiel malproksimen povas veturi al Nordirlando, kie ankaŭ troviĝas bonaj eblecoj por montri, kiel anglaj ĝentlemanoj devas konduti. Sed ili ne tretu sur hundetojn en Hyde Park. Anglio estas bestamanta lando.

Niĉjo

Internacia infanurbo en Danlando

En la vilaĝo Oksböl en okcidenta Jutlando oni komencis konstrui internacian infanurbon laŭ la ekzemploj en Svislando kaj Aŭstrio. Estas pastro Damgaard el Esbjerg, kiu iniciatis la aĉeton de domo apud Oksböl, kie komence la infanoj loĝos. Li precipe pensas pri la t.n. „usonanidoj“ en Germanio, t.e. la infanoj, kies patro estas usona soldato, ofte negro. Pastro Damgaard rakontas, ke estas lia plano daŭrigi la laboron tiel, ke ankaŭ estos spaco por infanoj el aliaj landoj. La laboron faras militrifuzantoj el la militrifuzantejo en Oksbölen dum ilia libertempo.

Willy Nielsen

LA ELSENDO DE ARTEFARITAJ TERSATELITOJ KAJ INTERPLANEDARAJ FLUGOJ

de Jurij CHLEBCEVIĈ

kandidato de teknikaj scioj en Moskvo

(Jen artikolo, speciale verkita por „PACO“, kiun al ni peris la Sovjeta Pres-oficejo en Moskvo (SIB). Ni esploras, ke ĝi interesos niajn legantojn.)

La revo pri interplanedaj flugoj embriiĝis jam dum foraj tempoj. Multaj diverspopolaj legendoj kaj fantaziaj romanoj sin dediĉis al la unuaj vojaĝoj de homoj en aliaj mondojn. La aŭtoroj de tiuj verkoj sendadis siajn heroojn al interplanedaj vojaĝoj per diversaj metodoj, komencante kun plej fantaziaj nerealaĵoj kaj finante kun alproksimiĝo al la realo. Tiel jam Sirano de Berĵerak (1619 – 1635j.) antaŭkuris al la ideo pri apliko de raketoj por kosmaj vojaĝoj. La komuna en ĉiuj ĉi verkoj estas, ke en la vojaĝoj nepre partoprenis homoj, kaj aliel oni eĉ ne povis pensi.

Ankaŭ la sciencistoj ne pensis aliel. Ĝis la plej lasta tempo en ĉiuj projektor kaj esploroj ili prezentis al si la unuajn vojaĝojn sur lunon kaj la aliajn planedojn, nur kiel flugojn de interplanedaj ŝipoj kun homoj surborde.

Tiamaniere la tuta literaturo, de la rigora ĝis la fantazia, enradikigis en la cerbon de la homaro la la prezentadon de la unuaj interplanedaj flugoj nepre kun la partopreno de homoj. Sed kiel plue montriĝos, la elflugo de homoj el la monda spaco ankoraŭ por longa tempo restos nura monopolo de romanverkistoj.

Antaŭ kelkaj jaroj la aŭtoro de tiuj ĉi linioj prilaboris projekton, kiu permesus efektiviĝi en la plej proksima estonto la unuajn flugojn de raketoj ekster la limon de nia tero sen homoj, kun la celo dum la sekvantaj 5-10 jaroj transporti al la luno la unuan ekspedicion kaj krei tie konstante funkciantan sciencan stacion kun homoj.

Ĉiuj publikitaj projektoj de sovjetaj kaj aliaj sciencistoj celas jam dum la unua esplora flugo efektiviĝi elementon de ekspedicio sur la lunon. La realigo de ĉi projektoj, pripensataj kaj konsiderataj ankoraŭ de multaj sciencistoj, estas ligita kun grandegaj malfaciaĵoj. Unue, ni tute ankoraŭ ne scias ĉion, kun kio renkontiĝos la universo-vojaĝantoj dum flugo al la luno. Tial ni dume ne povas antaŭvidi ĉion necesas por krei kondiĉojn, kiuj sekurigis la normalan vivon de la homoj en eksterteraj sferoj. Sekve ni ankaŭ ne povas antaŭvidi la ĝustajn sekurecmetodojn por defendi la flugmaŝinon kaj ĝian personaron. Poste necesas kalkuli kun la reflugo de la astrovojaĝantoj sur la teron kaj speciale kun la starto de la raketo el de la luno. Multaj kondiĉoj, kiuj esence influas la sukceson de ĉi entrepreno, ankaŭ ne estas konataj. Ekestiĝas la sorĉa rondo: Por atingi la lunon necesas unue multon ekscii. Kaj por ekscii multon, necesas komenci la flugojn. Oni povas klare al si prezenti kiom multan tempon, rimedojn kaj precipe homajn vivojn oni devos oferi, ĝis ni komencos difini taŭgajn metodojn por lukti kun a danĝeroj kaj hazardoj okaze de flugo sur la lunon, por efektiviĝi flugon de homoj en hermetika kajuto de interplanedara ŝipo.

Due, krom tiuj ĉi plej ĉefaj malhelpoj por la flugo de homoj sur la lunon, konforme al la antaŭaj projektoj, malhelpas ankaŭ principaj limitecoj de pure teknika karaktero. Ĉi limigoj prezentas la propra principo de la raketa moviĝo.

Por efektiviĝi la flugon el tero al luno kaj reen, la raketo devus havi rapidecon de prosimume 11 km po sekundo kaj por efektiviĝi starton sur la lunon, necesas aldona rapideco de 2,4 km/sek. Tio necesas por bremsi la rapidan falon sur la lunon per raketmoviĝilo. Sume la ĝenerala rapideco de la raketo por flugi el la tero sur la lunon, estos proksimume 13,5 km/sek. kaj ambaŭ-direkte tero-lunotero 27 km/sek. Praktike necesas ankoraŭ plialtigi la rapidecon je pluraj 10 %, rezerve por eventuala manovrado kaj neantaŭvideblaj intervenoj.

Sekve necesas certigi rapidecon por la lunoflugo, kiu egalos proks. 30 km po sekundo.

La entuta elspezo de energio por la flugo tero-luno-tero egalas al la elspezo de energio, necesa por aldoni al la raketo rapidecon de 30 km/sek. La rapideco de gaselfluo el raketa moviĝilo devas en la proksima estonto atingi nur 3,75 km/sek.

La sole realan vojon por forigi ĉi malhelpojn prilaboris Konstantin Ciolkovskij.

Li proponis la ideon de t. m. kombinitaj raketaj aŭ raketrajnoj. Tia trajno estas kombinita el kelkaj raketoj, fiksitaj unu al la alia, kies amplekso komence de la ĉefa ĝis la vosta parto de la trajno pligrandiĝas en geometra progreso. Tiu ideo de Ciolkovskij jam trovis praktikan aplikon en la kreo de la interkontinentaj raketoj kaj ankaŭ ĉe la raketoj, kiuj ekspedis la artefaritajn Sputnikojn en la universon. Ĝi teorie jam permesas konstrui raketojn, kiuj povos evolui grandajn rapidecojn dum limigita rapideco de la gaselfluo el la raketa moviĝilo. Sed tiam principan eblecon oni devas pagi per alta prezo. K. Ciolkovskij elkondukis la faman ekvacion de la movado de raketo en la libera spaco. En la apliko al la multeŝtupa raketo, fluganta laŭ *marŝruto* ter-luno-tero, ĉi formulo aspektas tiel:

La pezo de la raketo en la momento de la starto el sur la tero egalos la produktitan pezon de la raketo en la momento kiam ĝi revenas al la tero je la nombro 5 en la grado de la kvociento de divido de la entuta rapideco de la ekfluo de gaso el la raketa moviĝilo.

Ni jam konstatis, ke la sumara rapideco de la raketo, fluganta de la tero-lunon kaj reteren, egalas 30 km/sek., la rapideco de la gasoj elirantaj el la moviĝilo de la raketo 3,75 km/sek. Do, se ni konjektas en ĉi kazo, ke la pezo de la raketo kun personaro konsistanta el 3 homoj ĉe la returno teren egalas al 10 tunoj, substarigante ĉi ciferojn en la formulon, ni ricevos jenan rezulton:

La pezo de la raketo en la momento de la starto el la

$$\begin{aligned} \text{tero} &= 10 \text{ tunoj} \times 5 \left(\frac{30}{3,75} \right) = \\ &= 10 \text{ tunoj} \times 5^8 = 3.906.250 \text{ tunoj.} \end{aligned}$$

Sekve, por la flugo je *marŝruto* (vojo) tero-luno-tero por nia ekspedicio el 3 homoj, la komuna utila ŝarĝo, kiu pezos 10 tunojn (inkluzive la pezon de la raketo sen hejtaĵo kaj moviĝiloj), la starta pezo de la raketo por flugi lunon kaj returnen devus esti proksimume 4 milionoj da tunoj.

Tiamaniere, por mallongtempa flugo de 3 homoj sur la lunon kaj re, estus necesa okŝtupa raketo kun starta pezo, kiu superus 57-foje la pezon de granda oceanŝipo kun plena ŝarĝo kiel ekzemple „Kvin Elisabet“, kaj tia solvo laŭ inĝenera vidpunkto ne estas efektivebla. Do denove ni staras antaŭ senelira vojo.

Nun revenas la pli frua ideo de K. Ciolkovskij – la ideo, krei intermezan stacion, aŭ interplanedaran stacilokon en la kosmo – grandegan, artefaritan Sputnikon, kvazaŭ anstataŭteron kun homoj.-

Ĉi ideo en kombino kun la ideo de la multeŝtupa raketo ĝis la nuna tempo estis rigardata kiel la sola vojo por efektiviĝi la unuajn esplorflugojn de kosmaj ŝipoj kun homoj sur la lunon. Ĉu tiu ĉi ideo efektiviĝos, ĉu tuj, ĉu en la proksimaj jaroj? Ĉu tute ne? Tion ankoraŭ ne eblas diri.

El la rusa tradukis: **Esperanto-sekcio de Leningrada Domo de sciencistoj**

MALSANULO KUN FORTA VOLO

MEM-ano kaj ano de Vietnamana Pacdefenda Esperanto Asocio, k-do Nguyen Dinh NINH, kiu sekve de partopreno en la liberiĝa batalo kontraŭ la kolonigistoj nun kuŝas en sanatorio por tuberkulozo de Sam-Son vere ne ripozas pro la daŭra minaco de nukleaj armiloj al la homaro.

Aŭdinte pri la Aperio de prof. Albert SCHWEITZER kaj ceteraj kuraĝaj atomscienculoj, ricevinte specimenon de la Ĉeĥoslovaka subskriblisto li tuj pretigis similajn en vietnama lingvo kaj komencis kolekti subskribojn inter la kuracistoj, oficistoj kaj malsanuloj de la sanatorio. La rezulto estas surpriza: li sendis al la SCHWEITZER-KOMITATO jam multajn listojn kun entute 470 subskriboj.

Ĉu tiu ekzemplo ne estas hontiga por niaj sanaj k-doĵ, kiuj simple rifuĝas antaŭ tiu laboro kun elturniĝo, ke mankas tempo?

Rud. Burda

STUDENTOJ EL KOREIO LERNAS ESPERANTON EN ĈEĤOSLOVAKIO

Post la bataloj en Koreio multaj orfoj venis al Ĉeĥoslovakio por ricevi helpon. La ĉeĥoslovaka registaro donis al ili senpaĝajn stud-eblecojn en diversaj fakoj. Post 5 jaroj kelkaj jam finstudis kaj reiris sian patrion por gvidi ĝian rekonstruadon. Multaj ankoraŭ daŭrigas la studadon ĉi tie. Ili ĉiuj jam ellernis la ĉeĥan lingvon. Inter la koreanoj en urbo Plzeň, kelkaj decidis lerni la internacian lingvon Esperanto. Por ili estas multe pli facila la lernado ol por ĉeĥoj kaj slovakoj. Ili rapide progresas kaj perfektigas. Kelkaj el ili post 5 monatoj reiros al Koreio, kie ili jam fariĝos instruistoj kaj aktivaj propagantistoj por disvastigi ankaŭ en tiu malproksima lando nian lingvon kaj espacmovadon inter siaj samlandoj. La plej aktivaj jam deziras ligi internaciajn kontaktojn. Vidu la anoncojn sub „Korespondi Deziras“!

Esp-rondeto-Plzeň

HALTIGU LA ATOMBOMBAJN EKSPERIMENTOJN!

Sub tiu ĉi devizo kaj bildo de teruriga virino el Hiroŝima eldonos la ĉeĥoslovaka MEM-sekcio belkoloran glumarkon en kvanto de 100.000 ekz-oj. Ĝin uzos la esperantistoj propagandcele por sia korespondaĵo. La saman glum. ĝi eldonos ankaŭ en ĉeĥa lingvo. La vendoprezon ni ankoraŭ ne scias, sed certe ĝi ne estos alta. Anoncu viajn mendojn jam nun al: K-do. Rudolf BURDA, Palackého nám. 6, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio. Ni liveros ankaŭ al eksterlando rekompence por jarabonoj de „PACO“ kaj Esp-literaturo.

ADRESSANĜO

La nova adreso de Vietnamia Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA) kaj de nia MEM-peranto estas: K-do Dao Anh Kha, Hoi Quoc-te-nga, Bao-ve Hoa binh, Viet-nam, HANOI, Vietnamio. Al ĝi direktu tiurilatan korespondaĵon.

POST DUSEMAJNA LERNADO LI INTERKOMPREENIĜIS

Okaze de alveno de bulgara kuracista brigado en Vietnamo la Vietnamia Pacdefenda Esperantista Asocio aranĝis en Hanoj bonvenigan kunvenon, en kiu dum teo-vespero disvolvis amika diskuto kun bulgara d-ro.esp-isto Todor Todorov. Li rakontis, ke li eksciis dum renkonto kun vietnama kuracisto Ky en malsanulejo n-o 108, ke tiu post nur dusemajna lernado kapablis tute bone interŝanĝi medicinajn spertojn jam kun li. Ĉi kunvenon ĉeestis reprezentanto de Vietnamo el Monda Packonsilantaro, la estraro de VPEA kaj ĵurnalistoj de vietnamaj gazetoj de Hanoi. Pri la kunveno favore raportis la ĉefurba gaz. THŪ DŌ, kaj THŌI MŌI.

LA INTERESO POR ESPERANTO EN VIETNAMO KRESKAS

Laŭ raporto de ĉiutaga ĵurnalo „Thŭ Dŏ en ĉefurbo Hanoi funkcias nun 5 kursoj por komencantoj por interesuloj, kiuj aliĝis antaŭ la 31. de novembro. Tiuj, kiuj aliĝis post tiu dato devas atendi la inviton al pli postaj kursoj. La intereso de vietnama popolo por Esperanto estas tiel granda, ke pro manko da instruistoj oni devas ofte monatojn atendi, ĝis oni povas esti akceptitaj en la kursoj.

LA >MANIFESTO DE PACO < ESPERANTIGITA

Nia Esp. rondeto ĉe la Uzina klubo de la Maŝinfabrikejoj en Pĕřerov (Ĉeĥoslovakio) tradukis la „Manifeston de Paco“, kiun en Moskvo subskribis pli ol 60 reprezentantoj de diverslandaj laboristaj partioj kaj jam sendis kelkcent ekzemplerojn al alilandaj esperantistoj. Kiu deziras ricevi ĝin, skribu al: Esperantský kroužek závodního klubu ROH, Pĕřerovské strojírny, PĕřEROV, Ĉeĥoslovakio.

NOVA MEM-PERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Nia malnova peranto, k-do František LIČKA el Ostrava, kiu dum jaroj sinofereme kaj honeste plenumis ĉi funkcion, devis ĝin lasi pro troa okupiteco. La estraro ĉi okaze esprimas al tiu oferma pacbatalanto sian plej koran dankon.

Kiel nova MEM-peranto funkcias nun k-do profesoro Ernesto GELETA, 11letá střední škola (maĉarská), NOVÉ ZÁMKY, Slovenio, ĈSR. La eldonatoj de nun sendu „PACO“n al lia adreso.

ESPERANTAJ NOVAĴOJ EL ESTONIO

En la fino de pasinta jaro revenis el Armenio al Tallinn estona esperanta pedagogo A. Siitan, kiu en Erevano instruis Esperanton dum kvar semajnoj en ŝtata universitato, pedagogia instituto kaj ŝtata literatura centro al ĉirkaŭ 200 partoprenantoj.

En la fino de la kursoj estis en televido renkonto inter malnovaj kaj novaj esperantistoj. Oni interŝanĝis impresojn pri kursoj kaj A. Siitam donis, kun laborantoj de telestudio, esperantan prolecionon.

Reenveturante A. Siitan haltis en Tbilizo kaj Rostov kie li donis provlecionojn. En Moskvo li konatiĝis kun plej aktualaj problemoj por disvatigi Esperanton en proksima estonteco.

* * *

En kuracurbo Pärnu funkcias du Esperantoj-kursoj kun 60 partoprenantoj. Oni laboras jam de oktobro 1957. Gvidas esp. intruistino Hilda Pöld.

* * *

En Kilingi-Nömme komenciĝis laboron en januaro ĉ. j. du esperantaj studrondoj, por komencantoj kaj daŭrigantoj kun 35 partoprenantoj. Inter komencantoj estas gvidantaj laboristoj de oficejoj, pedagogoj ktp.

Ambaŭ studrondojn de urba kulturdoma gvidas malnova s-ano Arnold Munak.

* * *

En februaro komenciĝos en Tallinn du esperantaj kursoj por komencantoj. Ĉiu merkredo estas kunvenoj de Tallinna Esperanta Sekcio (str. Viru 3) kun „Viva gazeto“.

Arne MUNAK, Kilingi-Nömme

LA KONFERENCO EN KAIRO RICEVIS MULTAJN SALUTOJN

KROM LA MEM-ESTRARO MULTAJ ALIAJ LANDOJ SENDIS SALUTLETEROJN AL LA KONFERENCO DE AZIAJ KAJ AFRIKAJ POPOLOJ, INTER ILI ANKAŬ LA V.P.E.A.

HỘI QUỐC TẾ NGŨ BAO VỆ HÒA BÌNH VIỆT NAM

VIỆT NAM DÂN CHỦ CÔNG HÒA ĐỘC LÃ – TU DO – HANH PHÜC

Vietnama Pacdefenda Esperantis Asocio

VIETNAMA DEMOKRATA RESPUBLIKO

Sendependeco – Libereco – Feliĉo

(MEM-sekcio)

HANOI, la 10an de Decembro 1957

**La Centra Komitato de Vietnama Pacdefenda Esperantista Asocio al:
La Popolara Konferenco de Aziaj-Afrikaj Landoj en Kairo (EGIPTIO)**

Tre estimataj gereprezentantoj de Azio kaj Afriko.

En la nomo de la tuta membraro de Vietnamaj Pacdefenda Esperantista Asocio.

Ni havas la grandan honoron prezenti al vi nian plej varman saluton de amikeco kaj de solidareco. Konsciente pri la grafa signifo de la historia Popolara Konferenco de Aziaj-Afrikaj Landoj en Kairo kaj pri ĝia granda rolo en la heroa batalo de Aziaj kaj Afrikaj popoloj kontraŭ imperialismo kaj kolonialismo, ni solene esprimas al Vi la varmajn gratulojn kaj plenan apogon de la vietnamaj geesperantistoj-pacdefendantoj.

Ni estas konvinkitaj, ke la Popolara Konferenco de Aziaj-Afrikaj Landoj en Kairo ne nur antaŭenpuŝos grandskale la heroan batalon de Aziaj kaj Afrikaj Popoloj kontraŭ imperialismo kaj kolonialismo, sed ankaŭ, ĝi malfermos novan etapon por ili starigi egalrajtajn kaj interhelpajn rilatojn kulturajn kaj sociajn, en favoraj kondiĉoj de l'Mondpaco, kiun ili ĉiurimede kaj kune protaktadas.

Por tia nova etapo de kultura kaj socia interŝanĝado inter aziaj kaj afrikaj landoj, ni solene proponas al Vi, la utiligon de la internacia helplingvo Esperanto, scienca kaj arta helplingvo, kiu per ĝia nekomparebla simpleco kaj beleco, plene taŭgas por aziaj kaj afrikaj amaspopoloj. Ni solene proponas al la Konferenco, kaj pere de ĝi, al la registaro de ĉiu lando en Azio kaj Afriko, helpi la disvatigon de Esperanto en tiuj landoj kaj utiligi ĝin por interlandaj rilatoj anstataŭ la ĝisnuna uado de lingvoj de kolonialistaj landoj, tio de miloj da jaroj, trudis kaj trudas ili veran bazon de malegalrajteco.

Kun la konvinka espero, ke la ideo de la helplingvo Esperanto estus konsiderota favore de Vi kaj de ĉiuj aziaj kaj afrikaj popoloj en proksima estonto.

Ni tutkore deziras al vi, eminentaj kaj tre estimataj gereprezentantoj de Azio kaj Afriko, bonsanon kaj plenan sukceson en via grandanima kaj sindonema laboro en la Popolara Konferenco de Aziaj-Afrikaj Landoj en Kairo.

Por la Centra Komitato de la Vietnamaj Pacdefenda Esperantista Asocio,

Vic-Prezidanto, **NGUYEN-HAI-TRUNG** Prezidanto, **NGUYEN-DUC-QUY**
Ĝenerala Sekretario, **DAO-ANH-KHA**

GRAVA ATENTIGO

Ĉar tiu ĉi n-o enhavas vere valorajn kaj ĉiam aktualajn raportojn, ni eldonis ĝin en multe pli granda kvanto por ke vi povu ĝin uzi por propagandaj celoj. Sendu ĝin al viaj korespondantoj! Varbu abonantojn! Helpu kreskigi nian movadon!

Traduku el ĝi por viaj nacilingvaj gazetoj kaj informu nin pri viaj sukcesoj. 1 ekz. kostas nur 2.- Kĉs aŭ 3 int. kup. inkluzive poŝtafrankon.

Okaze de pli grandaj mendoj eksterlandanoj povas ankaŭ rekompenci per samvaloraj Esp-libroj.

Mendu tuj ĉe k-do Rudolf BURDA, Palackého nám. 6, PLZENĚ, ĈSR.

Kiu bezonas Esp-leterpaperon, kovertojn, poŝtkartojn, glumarkojn kun pacemblemoj, mendu ĉe k-do. Josef REISER, Nádražní 34, PLZENĚ Ĉeĥoslovakio

ADRESSANĜO: Ekde februaro 1958 mia adreso Kompedallejren, Engesvang, ne plu valoras. Leteroj sendotaj al tiu ĉi adreso veŝajne ne atingos min. Mia provizora adreso estas: Willy Nielsen, Engholm, **Bjerby pr. Hjörriing**. Mi sciigos tuj, kiam mi ricevas pli konstantan adreson.

Willy Nielsen, MEM-peranto, Danlando

REGŬSTIGO

MEM-peranto en Vietnamio: K-do. DAO-ANH-KHA, Centra Biblioteko, Pho Trang-Thi, HANOI, (Jarabono: 3.000 dong.)

MEM-peranto por Kamboĝo: Kdo. DINH-THUAN-MY, Esperanto-rondo, B. P. n-o 482, PHNON-PENH, Kamboĝo. (Jarabono: 30 riel.)

ESPERANTISTOJ KONTRAŬ ATOMBOMB-EKSPERIMENTOJ

Nia lasta artikolo „Kion fari ĝuste nun“, aperinta en la franca eldono de nia organo, ne multe diris, sed tamen instigis jam multajn esp. pacamikojn en diversaj landoj al aktiveco. La subskriboj por la peticio de la „Albert Schweitzer Komitato kontraŭ Atombombprovoj“ jam proksimiĝas al la cifro de 50.000. Nur en Ĉeĥoslovakio oni kolektis pere de esp. pacdefendantoj jam 20.000 subskribojn. Ĉiuj koreiaj gestudentoj, studentaj en urbo Plzeň aliĝis al la peticio, El Vietnamia Dem. Respubliko atingis nin kelkcent subskriboj. Same estas en Japanio, Ĉinio, Francio, Italio ktp. Escepte la Asocio de Esperantistoj en Polio respondis, ke kolektado de subskriboj kontraŭ atombomboj estas nura afero de la landa Packonsilantaro en kiu esp-istoj ne rajtas kunlabori. Certe iom da nekomprenemo ĉi tie regas. Iom post iom ankaŭ venas subskriboj el Germanio-DDR kaj en Okc. Germanio oni verŝajne jam kolektis milojn. La cifro de kolektitaj subskriboj en Nederlando ankoraŭ ne superis tiun de Ĉeĥoslovakio, ĉar kvankam en Nederlando estas multaj esp-istoj, tamen mankas aktivuloj kaj komprenemo. Sed ĉiam pli ol 90% de la petitaj personoj entuziasme subskribis. Ĉiutage atingas la Komitaton novaj kaj novaj subskriblistoj. Inter ili esp-istoj ludas la ĉefan rolon. Tamen la ĝisnunaj rezultoj povus esti multe pli grandaj, se ĉiu nia leganto komprenus la altan valoron de tiu ĉi entrepreno. La Schweitzer-Komitato ankoraŭ ne povas prezenti al niaj legantoj precizajn cifrojn pri la kolektitaj subskriboj en diversaj landoj, ĉar la komitatanoj estas nun multe okupitaj per

kalkulado de subskriboj kaj skribado de dankleteroj al plej aktivaj kolektankotj. En fino de marto la Komitato intencas transdoni la peticion akompanatan de subskriboj el ĉiuj landoj al la Organizo de Unuigitaj Nacioj. Ĉiuj MEM-perantoj ricevis specimenon de la ĉeĥoslovaka presita subskriblisto kun peto, aranĝi tiajn listojn en nacia lingvo kaj organizi kolektadon de subskriboj en siaj landoj. Ni esperas, ke jam ĉiuj diligente laboras por la plena sukceso de nia entrepreno.

La tempo rapidas, restas nur mallonga termino. Ĉiu esperantisto plenumu sian devon! Kiu ne havas liston, pretigu ĝin mem laŭ la teksto en la lasta „PACO“ (januara). Kiu sendos pli ol 200 subskribojn por nia peticio, ricevos de la Komitato specialan dankleteron. Malproksimaj landoj sendu la subskriblistojn aerpoŝte.

Nia adreso:

Komitato de Albert Schweitzer kontraŭ Atombombprovoj
Sekr. J. Le Rütte, Wassenbergstr. 9, Ila
GRONINGEN, Nederlando

ĈE SOVJETAJ ESPERANTISTOJ

Dum la internacia renkonto de junaj esperantistoj, kiu okazis dum la sesa Festivalo de junularo de studentoj, sovjeta junularo aranĝis kontaktojn kun amikoj el multaj landoj. Inter ili komenciĝis vigla korespondado. Rememorante pri la neforgeseblaj renkontoj dum la Festivalo sovjetaj esperantistoj rakontas pri tio sur paĝoj de gazetoj kaj ĵurnaloj. Ekzemple literatura gazeto „Podjom“ (Levo“) eldonata en urbo Voronej, publikis skizon de ĵurnalistino Kretova „Kvar tagoj“. La aŭtorino detale rakontas pri la renkonto de junaj esperantistoj dum la Festivalo. Monata literatura gazeto „Neva“ aperanta en Leningrado, publikis antaŭ nelonge skizon de leningrada esperantisto Ĥitun, kiu detale rakontas pri la renkonto kaj pri rolo de Esperanto en la batalo por la paco. La ĵurnalo „Sovjetskaja Belorusija“ („Sovjeta Blankrusio“) publikigis konversacion kun konata blakrusa verkisto Janka Maŭr. En daŭro de multaj jaroj li uzis kaj uzas Esperanton en sia literatura laboro ĉi verkisto korespondas kun esperantistoj el multaj landoj. Similajn materialojn publikigas ankaŭ aliaj gazetoj kaj ĵurnaloj, kiuj aperas en diversaj urboj de Sovjeta Unio.

Antaŭ kelkaj monatoj en librovendejoj aperis nova lernolibro de Esperanto. Libreto en blua kovrilo kiu enhavas mallongajn ĝeneralajn informojn pri Esperanto, gramatikon de la lingvo kaj vortareton. La lernolibro estas eldonita en Leningrado. Ĝia eldonkvanto estas 95.000 ekzempleroj. Aŭtoro de la lernolibreto estas leningrada lingvoscienciuolo Nikolaj Andrejev. Preskaŭ samtempe aperis en Riga alia helplibro de Esperanto, esperanta-latva kaj latva-esperanta vortaro. La libroj estas rapide disvendataj. En la momento, kiam estas skribitaj tiuj vortoj, ni ricevis informon, ke en urbo Tallin ankaŭ aperis lernolibro de Esperanto en estonta lingvo kun aldona vortareto.

El urbo Erevan ni ricevis informos pri estonta eldono de nova gazeto „Armena esperantisto“. Antaŭ nelonge en urbo Minsk estis kunveno de blankrusaj esperantistoj, en kiu oni fondis Esperantistan Union por Blank-rusio.

Antaŭ nelonge per Moskva Radio parolis esperantlingve k-do S. Saryĉev. La relacio estis organizata laŭ peto de bulgara amikoj. La parolanto rakontis pri kontaktoj de sovjetaj esperantistoj kun samideanoj el multaj landoj, en aktiva batalo por la mondopaco.

G. Korotkeviĉ, Moskvo (peris: S. I. B.)

PRETERLASO DIKTATA DE LA CIRKONSTANCOJ

Kvankam tre dezirinde, tamen ne estas eble pro manko de spaco publikigi en nia gazeto la deklaron, rezoluciojn kaj rekomendojn de la solidareckonferenco inter la Aziaj kaj Afrikaj landoj en Kairo pri la aferoj de paco, kulturo, komerco, agrikulturo, industrio, internacia kunlaboro, kontraŭimperiismo kaj rasdiskriminacio. Por publikigi la dokumentojn estus necesa 16-paĝa gazeto.

La situacio tial necesigas, ke nur estas eble studi la aktojn de nomita konferenco en la nacilingvaj pac- kaj progresemaĵaj gazetoj. Dume ĉiu MEM-ano senlace klopodu altigi la eldokvanton de PACO, kompletigi la eldonliston kaj per tio ebligi la kreadon de pli multpaĝa gazeto por ke gravaj konferencoj ne plu „brilu kun sia foresto“ en ĝi.

43-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTISTO

2. – 9. aŭgusto 1958 en MANIZ – Germanio

Laŭ oficiala komuniko de Konstanta Kongresa Sekretario, G. C. Fighlera le mondkonata Firmo Gevaert decidis eldoni kolorfilmon en Esperanto, kiun ĝi unuafoje prezentos al la partoprenontoj de la Universala Kongreso en Mainz.

En la kadro de la Kongreso prelegos japana prof. Hideo Yagi pri „Domaĝo de atombombo en postaj jaroj“. La internacia Arta Teatro prezentos dum la U.K. la ĉefverkon de norvega verkisto Ibsen, „Fantomoj“. Ĝis la 15-a januaro aliĝis la Kongreson 931 personoj el 27 landoj.

NI RECENZAS

Ni mencias en PACO unuope ricevitajn esperantoverkojn kaj **recenzas** duope ricevitajn. Sendu al la centra redaktoro de PACO.

* * *

„EL POPOLA ĈINIO“ dumonata revuo. Formato 19x26 cm. Presita sur bela papero en formo de broŝuro kun multaj interesaj ilustraĵoj.

Tiu ĉi ŝatata revuo ĉesis antaŭ 4 jaroj (en 1953) aperi. Nun dank` al la pli bonigitaj cirkostancoj ĝi ree aperas. La unua eldono konsistas el raportoj pri diversflanka vivo kaj kulturo de ĉinaj popoloj. Ĝi enhavas ankaŭ valorajn sciigojn pri la restarigo de la Esperanto-movado en la granda Ĉina Popola Respubliko. Estas necese ke tutmondaj esperantistoj amase ĉi belan revuon abonu. Detalajn informojn petu ĉe viaj landaj gazetdistribuejoj, aŭ rekte ĉe la administracio de „EL POPOLA ĈINIO“, Ĉina Esperanto Ligo, P. O. Kesto 77, PEKING, Ĉinio. De viaj abonoj dependas la plua eldonado de ĉi interesa revuo.

* * *

Vortaro Esp-estona kaj estona-esperanta de H. Sepamaa, poŝformato, broŝurita kun 160 paĝoj, eldokvanto 10.000. bele presita, eldonis la Esperanto-rondo en Tallin (Estonia S. S. R.). Jen la unua oficiala eldonaĵo en Estonia S. S. R. post multaj jaroj da stagnacio. Ĝi certe bone servos al disvastigo de nia lingvo.

* * *

„INTERNACIA ĴURNALISTO“ estas de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio. La unua n-o (prestita) atingis nian redakcion. Inter aliaj raportoj ĝi enhavas la asocian regularon. Ĵurnalistoj-esperantistoj estas invitataj aliĝi ĉe k-do Ivan KEREMIDCIEV, Bulv. Hristo Botev 98, SOFIA, Bulgario.

MEM-SEKRETARIEJO:

Ĝen.-sekr.: Anton Balague, Postfach 94, **St. Pölten**, Aŭstrio.

Prez.: Rudolf Burda, Palackého nám. 6, **Plzeň**, Ĉeĥoslovakio.

Helpsekr.: Karl Kvist, Box 109 A, **Deje**, Svedio.

Centra red.: Gösta Holmkvist, Rönneholmsvägen 55, **Malmö V**, Svedio

KIEL DUM ĈI TIU PRINTEMPA MATEN'

El Të-Hanh

Kiam Partion mi aliĝis, brilis suno
floroj naskis sur herbar' printempa lumo
Rapideme fluis dudek-kvinjara sang'
Bruis la animo per dimanĉa kant'
Partion kiel unuan amatinon mi alvenis
Kiun ebria koro mia, kove atendi emis
Dankemaj okuloj je dolĉa font' infana
Rigardis la vivon tra nebul' diafana
En aliĝ-nokto heziteme flustris nur mi:
„Volas mi kredi, ami
Ĉu homo esti por mi?“

Sur blanka papero mi skribis kun zorgo
„Libero“ – tiu ĉi vort' kun am' agordo
Aŭroron mi atendis, forpasis tago post tag'
Ĝin kokoj anonci pretendis per ilia kant'
El paĝoj de la viv' kun diversaj bonodoroj
Ektrovis mi kial la homar' suferis dum miljaroj
En mia poeziflu' la ĉagren-nuboj iĝis helaj
Kaj esperigaj sunradioj pri trembrilaj.
Kun laborist' en profunda arbaro
atendadis mi tagon varmigan,
Kun kamparisto en seka rizejo
Sopiradis mi pluvon freŝigan
Kiam lun' silente sin kaŝis en kokosarb'
Ektremis mi kun la kor' partizana je la gard'
Pro ofteĝaj malhelpoj en soleca nokto
Post mallum' kun malĝoj' de pasintec' okazis
lukto
Dubo kiel rato blekis kvazaŭ nokto estus frapo
Min mem demandis mi: Ĉu vere libera mi jam?
Sed aŭroro ekvokis nur: „Samideano!“
Trovita fumata plado terpoma je litkapo
Certigis min, ke mia vivo meritas jam amon.

Depost tiu temp' de ĉiu jara sezon'
Konas mi fruktojn kaj ilian prezon

De l' sovaĝa herb' de l' arbara bird' la nomon
...
Memoras mi haltojn armeajn kaj dumnoktajn
movojn
Lacega apud rivereto mi tiam dormegis
Kiu scias, kial mian koron ĉiam entuziasmigis
se oni nomon de soveta samideano ree vokis?
Neniam ankoraŭ vidis mi Onklon Ho
Sed sama ĉe mi por Li kiel de l' barko al maro
sopiro.
Sed kial? Ho, mia rezistmovada fratini!
Sufereme kaj pasie mi amas cin
Cin amas mi pro viaj vangoj palaj
- Postsigno de l' tagoj fume-flamaj –
Pli ol pro ĉiu ajn modvestaĵo aŭ ŝminko iu
Kial? Kial? Ĉar havas mi la Partion.

... Ĉi-matene, je l' komenc' de l' printempo
Mi venis viziti ci – kvazaŭ luno men enirus
ĉambreton
Kun emociigitaj okuloj demandis ci sincere:
„Ĉu plimulte la Partion ol min mem amas ci
vere?“
Manon cian karesis mi malrapide, tenere:
„Mi cin amas por la Partion plimulte ami
Mi la Partion amas – por cin ĉiam ami
Jen karulin'!
Se iu katastrofo venos
Nepre ni suferos kaj ni ĉagrenos
Sed pli bone ni nin komprenos
Kiam post la pluv' per nova vento
verda foliaro ektremos
Radie juna fariĝos nia amo
Kaj radie juna amo por Partio nia
Tial dum ĉi tiu printempa mateno
tenas mi ankaŭ manon cian.“

Trad. Dao-anh-Kha (kun fajl' polurtuŝoj de kata
kano) 9/II/58

Rim. De la redakcio: Kun hezito ni publikigas ĉi poemon, ĉar ni konscias, ke multaj niaj eŭropaj legantoj tre malfacile komprenos ĝia veran sencon. Ĝi esprimas la sentojn de l' vietnama popolo, kiu venis el sklava kolonialismo subite en liberecon. Estas malfacile traduki vietnamajn poemojn kaj sentojn por esti kompreneblaj al eŭropaj popoloj. La Esp-tradukon de k-do Dao-Anh-Kha devis laŭ almetita vietnama originalo klarigi en franca lingvo k-do Nguyen van Quang, ambasadoro en Ĉeĥoslovakio kaj nur post tiuj klarigoj nia sperta k-do „kata kano“ sukcesis prezenti al ni ĉi supran reversaĵon. Bonvolu atente studi la esprimitajn, profundajn sentojn en tiu ĉi poemo de vekiĝinta popolo kaj ne vidu en ĝi kiel vi kutimas vidi en eŭroplingvaj verkoj, politikan propagandon.

KORESPONDI DEZIRAS

Korespondanancojn mendu kaj pagu ĉe via landa MEM-peranto. Ĉiu anoncanto devas almenaŭ unufoje per il. p. k. respondi al la korespondproponantoj aŭ transdoni la ricevitan korespondaĵon al ali interesulo kiu respondos.

K-do. Jiří LIHAŘ, Engelsova 529/18, MLADÁ BOLESLAV (Ĉeĥoslovakio (29 j.). Kun ĉiuj landoj kaj ankaŭ liaj gekursanoj serĉas korespondantojn.

K-do. Vojtěch TROJAN, ŽACLÉR, Ĉeĥoslovakio. Kiun ĉiuj landoj pri div. temoj.

K-do. LIU Zyn, No. 3 Lane 2, Plot 5, Kingsing Street, Tiehsi District, SHENYANG (Mukden) Ĉinio-China, serĉas kunlaborantojn, kiuj povus publikigi kaj eldoni nacilingve ĉinaj Esperanto-tradukaĵojn.

K-dino. Josefino KRUCKÁ (45 j.), PLZEŇ, Farského č. 16, Ĉeĥoslovakio. Kun ĉiuj landoj per let. k. bildkartoj.

K-do. KIM Jong (korea studento). Engelsova č. 1, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio. Kun ĉiuj landoj. Post ½ jaro mi jam skribos al vi el Koreio.

K-dino. Miloslava HULEŠOVÁ, PLZEŇ, Jagelonská č. 18, Ĉeĥoslovakio (33 j.), instruistino, dez. interŝ. bildkartojn kun ĉiuj landoj.

K-do. Ladislav SVOBODA, Jasanová, PLZEŇ-Slovany, Ĉeĥoslovakio. Interŝ. bildkartojn kun ĉiuj landoj.

K-do. Vilém HOFMAN, Zborovská č. 66, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio. Kun ĉiuj landoj.

K-dino. Zdeňka PAVLÍČKOVÁ (30 j.) sanitara laborantino, Čermákova č. 10, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, dez. koresp. kaj interŝanĝi vidaĵkartojn kun ĉiuj landoj.

K-do. Karel OTTA, Sládkova č. 444, STARÝ PLZENEC u Plzně, Ĉeĥoslovakio, dez. interŝanĝi il. gazetojn, fotojn, bildkartojn, kiuj rilatas sporton kaj p. m. kun ĉiuj landoj.

K-do. Václav KLÍMA, Sokolská 29, PLZEŇ-Letná, Ĉeĥoslovakio. Kun ĉasistoj el ĉiuj landoj. Interŝ. tionrilatajn gaz. fotojn, bildkartojn ktp.

K-do. Karel KARPECKÍ, NÁVSÍ č. 228, okres Český Těšín, Ĉeĥoslovakio (19 j. studento) pri ĉiuj temoj kun la tuta mondo.

K-do. Attila PIROŠKA (18 j.), Ubyk. č. 7, Václavkova č. 772-II-24, ML. BOLESLAV, Ĉeĥoslovakio. Interŝ. il. p. k. kaj il. gazetojn kun ĉiuj landoj.

ESPERANTO-SEKCIO, Dom uĉenih, Dvorcovaja nab. 26, LENINGRAD D-65. Sovjet-Unio. Kun ĉiuj landoj.

K-do. Vladimír BOŘÁNEK, Zborovská 37, Ĉeĥoslovakio. Interŝanĝas p. m. kaj il. p. k. kun tutmond. filatelistoj.

K-do. J. HŮLA, Vrchlického č. 20, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio (oficisto) interŝ. vidaĵkartojn kun ĉiuj landoj.

K-do. Josef ČIHULA, třída 1. máje 134, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio. Volonte interŝ. il. p. k. sportgazetojn kaj amatorajn filmojn.

K-do. Bohuslav KRULICH, Husovo nám. 5, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, pri ĉiuj temoj. Inteŝ. p. m., alumentvinjetojn kun la tuta mondo.

K-do. Dr. BEIER Sándor, Salcin n-o. 12, CLUJ, Rumanio, serĉas korespondantojn pro komencantoj, progresintoj kaj membroj de sia rondeto. Sendu unue nur bildkarton kun viaj deziroj!

K-do. Kim De Kvan (Koreia stud.), Žákovský domov, Engelsova 1, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, per il. p. k. prefere kolorajn. Kun ĉ. landoj.

K-do. Jun Dzin Son (Koreia stud.), Žákovský domov, Engelsova č. 1, PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, kun tutmonda junularo pri ĉiuj temoj kaj spec. pri literaturo. Interŝ. il. p. k.

K-do. KALINA Josef, Školní č. 31, PLZEŇ-Doubravka, Ĉeĥoslovakio, kun fotoamatoroj el ĉ. landoj kaj interŝanĝas il. p. k.

K-do. KOLOUŠEK Jindřich, Rokycanská č. 63, PLZEŇ-Letná, Ĉeĥoslovakio, pri ĉ. temoj, kaj il. p. k. Kun ĉiuj landoj.

K-do. Jan PUŽEJ, D. Z. Závody V. I. Lenina, Čechova ul., PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio, per let., il. p. k. Interŝanĝas p. m. kun Aŭstrio kaj Jugoslavio.

K-do. Rudolf KAJŠ, Opavská 75/82, VÍTKOV, Morava, Ĉeĥoslovakio, kun ĉiuj landoj per let. kaj il. p. k.

Bulgario. Grupo de bulgaraj novbakitaj esperantistoj deziras korespondi kun la tuta mondo. Adreso: Kurso de Esperanto, Polski Trambeŝ, **Tirnovsko.**

Rumanio. Mi estas muntisto (28-jara fraŭlo) kaj deziras korespondi per il. p. k. tutmonde pri la Esp.-movado kaj filatelio. Mi interŝanĝas Esp.-revuojn kaj librojn. Mia adreso estas: R.P. Romina – **Or. Stalin 1**, Cas. Postala n-ro. 17, K-do. Mihail Dungeanu.

Sovetunio. 30 gestudentoj en Instituto de Alilandaj lingvoj organizis esperantan rondeton. Ilin interesas la vivo de alilanda junularo. Ili deziras skribi multajn leterojn. Resp. garantita. Estas dezirindaj esperantaj propagandiloj en la angla, germana kaj franca lingvoj. Nia adreso: Esperanto-kruĵok, Insitut Inostrannih Jazikov, **Gorkij**, U. S. S. R.

Mi dez. koresp. tutmonde pri la Esp.-movado kaj interŝ. div. objektojn K-do. L., Tangscoo, Männiku 14, **Törva**, Estona SSR, Sovetunio

K-do. Teodor LJAŠEVIČ, poŝtrestante p/o Siverskaja, Gatŝinskij rajon, Leningradskaja oblast, Sovjet-Unio, interŝanĝas il. poŝtkartojn kun gesamideanoj de ĉiuj landoj.

K-do. VACULA Václav, ROUSÍNOV č. 282, okres Vyškov, Morava, Ĉeĥoslovakio. (20 j. studento) pri geografio, historio kaj interŝ. bildkartojn k. ĉ. l.

K-do. HELLMUT Nicolai, Lehrer, Mittelschule, HARTMANNSDORF bei Karl-Marx-Stadt, Germanio – D. D. R. liveras adresojn de 12-16 jaraj infanoj por korespondado.

Vietnamio. Vietnamaj verkistoj, poetoj deziras kor. kun ĉiuj landoj pri verkado, literaturo. Sendas francajn, anglajn librojn kontraŭ esp.-literaturaĵoj. Skribu a.l: Esperanto-sekcio – HOI NHA VAN, n=0 51, Tran-hung-dao, HANOI (Vietnamio).

Vietnamaj fervojistoj dez. kor. kun ĉiuj landoj. Skribu al Esperanto-sekcio TONG CUC DUONG SAT, **Hanoi** (Vietnamio).

Kuracisto dez. kor. kun ĉiuj landoj D-ro Ky, Benh vien 108, **Hanoi.**

Literaturisto dez. kun verkistoj, poetoj pri literaturo, organizo de kluboj, kulturdomoj, bibliotekoj, interŝanĝas fotojn, artajn reproduktaĵojn, bildpoŝtkartojn kontraŭ esperantaĵoj. K-do. Dao-duy-Ky, BO VAN HOA, **Hanoi** (Vietnamio).

Vietnama virina unuiĝo dez. kor. kun virinaj organizaĵoj el ĉiuj landoj. Interŝanĝas infandeseĝnaĵojn por la internacia infantago la 1/6. Skribu al Esperanto-sekcio HOI LIEN HIEP PHU NU VIETNAM HANOI (Vietnamio).

Vietnama gestudentoj dez. kor. kun ĉiuj landoj. Skribu al Studentara Unuiĝo. Esperanto-sekcio – LIEN HIEP SINH VIEN – VIETNAM – HANOI.

Kamboĝa revuo „Réalités Cambodgiennes“, No 4, Vithei Oknha Oum, PHNOM-PENH, Kamboĝo, decidis publikigi en kvar n-oj senpage korespondanoncojn de esp-istoj. Sendu tuj vian anoncon kun samtempaj gratuloj.

Esperanto-rondo, B. P. n-o 482, PHOM-PENH, Kamboĝo, kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj. Interŝanĝas, il. p. k., p. m., fotojn, insignojn ktp.

***La Internacian
Virinan Tagon ĉiuj virinoj eluzu
por aranĝi amasajn
protestojn kontraŭ la daŭrigo de
atombombaj eksperimentoj!***

Eldonis: MEM-sekcio de Distr. Packomitato en Mikulov, Ĉeĥoslovakio. Redaktis: K-do Gösta HOLMKVIST, Rönneholmsvägen 55, MALMÖ, Svedio kaj k-do. Rudolf Burda, Palackého nám. č. 6, PLZEŇ – Ĉeĥoslovakio.

Preis: Okcidentbohema presejo, nacia entrepreno en PLZEŇ, Ĉeĥoslovakio.